

Bulgara **ESPERANTISTO**



7-8

1969

ENHAVO

Paĝo

N. Aleksiev. Al nia hela jubileo	1
* * Barbaraĵoj de usonaj imperiistoj kaj ties sudvjetnamaj pupoj	2
V. Hanĉev. La bona lernanto (trad. Venelin Mitev)	3
N. Aleksiev. Nia neforgesebla Anĝelo	4
D. Martinov. Ivan Vasilev Grudev	6
T. Evstratieva. Lando de dinamika evoluo	7
A. Grigorov. Florado de la bulgara kulturo	8
Ĥr. Gorov. Sankta kaj eterna	9
Pacaktivulo. La tutmonda Pac-sembleo markis novan etapon en la por- paca batalo	11
N. A. Delegitaro de MEM en la Berlina Pac-sembleo	12
I. Sarafov. Mia dankemo*	13
L. Nikov. Tutmonda filatela ekspozicio en Sofio	14
N. Nanov. Nia sperto en instruado de Esperanto	15
Fr. Petkov. Bona organizado — bonaj rezultoj	17
D-ro Z. B. Batiŝnica — la unua en Bulgario	20
A. D. Atanasov. Eraroj en uzado de vortoj	23
L. Miĥajlov. „Kiel ekestos la ĝenerala lingvo?“	25
L. Paspaleeva. „Tera lumo“	26
L. Stojanov. La diabla trinkaĵo	27
N. Draganov. Atendado	28
T. Dunĉeva. De kio malsaniĝas la balenoj? La glacikovrilo de Antarktido	30
I. Kolarov, J. Dekova. Kanto de junaj esperantistoj	31

Sur la kovrilpaĝo:

La instruista Esperanto-kurso en Godeĉ

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungrio, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senp age

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, R. Kongresi Përmetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Televidenija D. 7, kor. 3, kv. 44, Moskva, M—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



AL NIA HELA JUBILEO

Ĉiu tago rapide nin proksimigas al la hela historia jubileo — 25 jaroj de la Socialisma Revolucio en nia lando. Nia popolo atingis la plej grandan venkon kaj la plej grandiozan ŝanĝon en sia multjarcenta vivo. Antaŭ ĝi malfermiĝis senfinaj eblecoj konstrui por si indan por la modernaj homoj materialan kaj spiritan vivon surbaze de la genia instruo de la senmorta Lenin.

Nun ĉiuj laboruloj streĉas fortojn digne renkonti la daton de la glora jubileo. Por ni, esperantistoj, tiu tutpopola strebo estas proksima kaj komprenebla. Ja ni aspiras atingi vivnivelon kaj kulturon je tutmonda plej alta skalo. Tial ankaŭ ni devas plenumi niajn labordevojn por havi la puran konsciencon de konstruantoj de la nova socia ordo — justa kaj feliĉa.

Ni ne dubas, ke la esperantistaro partoprenas ĉiujn progresemajn iniciatojn en urboj kaj vilaĝoj por noti novajn pli grandajn rezultojn en la batalo por pli feliĉa vivo de nia popolo.

Ni bone konscias, ke ankaŭ la klopodoj de la bulgara esperantistaro povis doni rezultojn, maloftajn por multaj aliaj landoj, dank' al la subteno flanke de la popola regpotenco, de la plej superaj gvidorganoj de Bulgara Komunista Partio kaj la Registaro de Patrolanda Fronto.

Ni danke informas niajn eksterlandajn amikojn pri la realigita de nia popolo progreso en ĉiuj sferoj de la vivo, pri ĝia senlaca batalo kune kun ĉiuj pacamaj ŝtatoj kaj movadoj por firmigo de la paco sur la Balkanoj, en Eŭropo kaj en la tuta mondo. Nia plej ĉefa apogo estas la multjara amikeco kun la grandega Sovetunio kaj ĝia heroeca popolo.

En la jubileaj tagoj ni ne forgesas la batalantajn por nacia sendependeco landojn, torturatajn de la tutmonda imperiismo frunte kun Usono. Ni tamen kredas forte en la stabileco de l'socialismo kaj la venko de ĉiuj progresemaj kaj pacamaj fortoj super la modernaj barbaroj el la imperiismaj rondoj. Por la jubileo kaj la jubileaj laborplanoj ĝis la fino de la jaro ni streĉu niajn fortojn! Ni preparu bone en aŭtuno la grundon por novaj Esperanto-kursoj, por plialtigo de la nombro de l'abonantoj de „Bulgara Esperantisto“, kies 50-jara jubileo feliĉe koincidas kun la tutpopola festo de Popola Respubliko Bulgario!

Antaŭen al novaj rimarkindaj sukcesoj!



ПИСАТЕЛЯТ ОРЛИН ВАСИЛЕВ НИ ОКУРАЖАВА

В бр. 183—184 на сп. „Пацо“ („Мир“) бе поместено есето „Братя-соколи“ от известния наш писател Орлин Василев, посветено на братята Кирил и Методий.

В ЦК на БЕС се получи следното кратко писмо, което не може да не зарадва всеки български есперантист:

„До редакцията на „ПАЦО““

Благодаря сърдечно за вниманието, което ми оказахте, като ми изпратихте броя с „Братя-соколи“.

Колко ми грижи ви стървеа поддържането на това дело!

Но — дерзайте!

София, 23. V. 1969

Орлин Василев

BARBARAĴOJ DE USONAJ IMPERIISTOJ KAJ TIES SUDVJETNAMAJ PUPOJ

Informo de Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio

De la 13-a de januaro ĝis la 3-a de februaro 1969 sub la komando de usona generalo Cooksey pli ol 8200 usonaj, pupaj kaj satelitaj soldatoj ĉirkaŭbaris kaj rastis la regionon Ba Lang An, konsistantan el kelkaj vilaĝoj de la provinco Quang Ngai. Ili utiligis aviadilojn, kanonojn, kirasĉarojn, militŝipojn, bombojn, fosforbombojn ktp. por ĉion dezertigi kaj ĉion forbruligi: domojn, havaĵojn, fruktarbojn, rizejojn kaj ĝardenojn de la ĉi tiea loĝantaro. Ĉe tio estis mortigitaj 204 personoj kaj enfermitaj pli ol 11 000 personoj, plejparte maljunuloj, virinoj kaj infanoj, en la koncentrejo de Van Thanh. Ĉi tie pro malsato kaj malsanoj mortis 20 infanoj.

Ne povante elteni en ĉi tiu jankia-pupa koncentrejo malliberecon, mizeron, malsaton, malbonan traktadon kaj torturojn, niaj sampatrujanoj unuiĝis kaj firme decidis leviĝi kontraŭ la jankioj kaj ties lakeoj, kiuj pro la intensa lukto estis devigitaj en februaro 1969 transloki 4000 personojn de Van Thanh al aliaj koncentrejoj.

Antaŭ ol likvidi la koncentrejon de Van Thanh, la jankioj kaj ties pupoj faris monstran krimon kontraŭ la tie enfermitaj loĝantoj de Ba Lang An. Trifoje (la 9-an, 20-an kaj 22-an de marto) ili enŝipigis po 400 enfermitoj, veturigis ilin en la maron kaj tie ilin drenigis. Iuj provis savi sin per naĝado al la bordo, sed la malamikoj pafadis kontraŭ ili.

Tiuj ekstreme barbaraj krimoj, same kiel la aliaj gravaj krimoj en Suda Vjetnamio ekde novembro 1968, pruvas, ke malgraŭ siaj pezaj malvenkoj la jankiaj agresantoj kaj ties pupoj sin montras ankoraŭ tre obstinaj kaj militemaj; ili kontinuas intensigi sian agresmiliton kaj akumulas siajn krimojn de gencido kontraŭ la sudvjetnama popolo.

Tiu ĉi ekstreme malhumana hommortigo komplete malkaŝas la militeman kaj perfidan

fizionomion de la administracio de Nikson, kiu kvankam parolas pri sia „pacvolo“, pri sia deziro „ne tuŝi la civilan loĝantaron“, ĉiamaniere klopodas puŝi sian agresmiliton en Suda Vjetnamio al ĝis nun nevidebla grado de krueleco.

Sed ju pli la jankioj kaj ties agentoj obstinemas daŭrigi la agreson kaj fari krimojn en Suda Vjetnamio, des pli ili boligas de malamego la sudvjetnaman popolon, kaj des pli ĝi streĉas sian unuiĝon, impetigas antaŭen kaj luktas kun pli firma decidemo por komplete venki super ili kaj meti finon al iliaj krimoj.

La barbara politiko de masakrado kaj ekstermado, kiu pruvis sin nekapabla forsavi la hitlerajn faŝistojn, ankaŭ ne kapablas forsavi la usonajn agresantojn kaj ties sudvjetnamajn lakeojn.

Ni energie protestis kontraŭ la supre menciita ekstreme barbara masakro antaŭ la publika opinio, enlanda kaj eksterlanda; ni insistis alvokas la tutmondajn popolojn, inkluzive la usonan popolon, la internaciajn demokratiajn organizaĵojn, la eminentulojn, partoprenintajn en la aktivecoj sociaj, juraj kaj en tiuj por la homaj rajtoj, la religiulojn kaj personecojn, luktantajn per paco kaj justeco en la mondo, ke ili severe kondamnu la usonajn agresantojn kaj ties lakeojn, ke ili prenu al si ĉiujn antaŭrimedojn por reteni iliajn sangajn manojn en Suda Vjetnamio kaj ilin venigi al ĉesigo de l'agreso, al komplete kaj senkondiĉa retiriĝo de ĉiuj usonaj kaj satelitaj trupoj el Suda Vjetnamio, al ebligo al la [sudvjetnama] popolo mem reguligi siajn proprajn aferojn laŭ la politika programo de la Nacia Fronto de Liberigo de Suda Vjetnamio sen fremda enmiksiĝo.

Suda Vjetnamio, la 2-an de aprilo 1969



LA BONA LERNANTO

de Veselin Hančev

Li estis tre bona lernanto.
La plej bona en nia klas'.

Ce la fenestro,
maldekstre,
sur la unua benko li sidis —
eta,
kun harar' kiel flamo,
ruĝa kaj kruda,
kun tuta stelar' da lentugoj
sur la du vangoj.

Li estis tre bona lernanto.
Li sciis ĉiun lecionon,
respondis ĝuste kaj klare,
ne mutis,
kiam de la katedro
la instruisto demandis:

— Kiuj estas la reĝoj de la dua
bulgara ŝtato?

— Kie troviĝas Acoraj Insuloj?

— De kiu kemi-valenteco
estas arĝento?

Li estis tre bona lernanto.

La plej bona en nia klas'.

Sed foje
subite
eniris la ĉambron
oficir'.

Rekta apud la katedro,
li montris
la unuan benkon ĉe la fenestro,
maldekstre,
kaj diris:

— Vi!

Ekstaru!

Venu al la tabulo!

Parolu!

Respondu detale kaj klare
al ĉiuj demandoj!

Estis dum lecion' de turmento...

De l' muro,
kiel de nigraj ĉeloj

Botev kaj Levski rigardis.

Sur la liberaj benkoj

sidis la tim'

kaj sufloris:

— Kiuj estis la homo',

kun kiuj vi renkontiĝis sekrete?

— Kie vi renkontiĝis?

— Kion al vi ili donis?

— Al kiu ĝin poste transdonis vi?

Diru!

Estis dum lecion' de silento...

Li estis tre bona lernanto.

La plej bona en nia klas'.

Antaŭ la tabulo

li staris.

Kaj lia ruĝa hararo

brilegis sur ĝia nigra ĉielo

kun nuboj de kreto.

Kaj lia vizaĝo

estis tiel trankvila

kaj tiel serena

sub la oraj lentugoj.

Li estis tre bona lernanto.

La plej bona en nia klas'.

Sed nun nenion li diris.

Ai ĉiuj demandoj

respondis per muto.

Li mutis,

kiam lin oni demandis

Li mutis

kiam lin oni jam ekkondukis.

Li mutis,

kiam jam staris — rekta—

apud la muro.

Li mutis,

kiam lastsonorilon

ektondris pafiloj.

Li estis tre bona lernanto.

Nun mutis.

Kaj ricevis superan sukceson

dum lecion' de senmorto!...

El bulgara: Venelin Mitev

Floradu kaj venku ĉiam la granda afero de la socialismo en nia lando!

Vivu la Bulgara Komunista Partio — nia saĝa kaj amata gvidanto laŭ la vojo de socialismo kaj paco, vojo de tutpopola feliĉo!

HEROA PASINTEGO

NIA NEFORGESEBLA ANĜELO

Kiu havis kontakton kun k-do ANĜELO (Angel Petkov Ivanov), li neniam forgesos la simpatian kaj treege modestan viron, kiu abnegacie laboris por la triumfo de progresemaĵoj liberigaj ideoj kaj pli speciale en la Esperantista Movado en nia lando. Se li estus restinta inter la vivantaj esperantistoj, nun li jam fariĝus 60-jarulo (naskita la



2-an de aŭgusto 1909 en urbo Oreĥovo, distrikto de Vraca). Sed la mortintoj por la liberigo de nia lando elsub la jugo de la faŝismo restas en nia memoro ĉiam kiel junaj agloj, batalintaj ĝis la lasta guto da sango kontraŭ la mala-

mikoj de l' popolo kaj falintaj fiere kaj digne en tiu „sankta batalo“, kiel ĝin prikantis nia genia poeto Hristo Botev.

Anĝelo estis senbrua, disciplinita, plenumanta tute konscie siajn devojn soldato de la Komunista Partio kaj la Laborista Movado. Ĉiam ridetanta per ia, propra nur al li milda esprimo de la vizaĝo, li estis preta fordoni eĉ sian vivon por la venko de la komunismo. Tia restis por ĉiam en nia memoro la portreto de tiu ekzemplodona amata kamarado.

Mi deziras rakonti pri unu momento el la vivo de Anĝelo, kiu vekis simpatian eĉ en personoj, starantaj malproksime de la komunistoj. Ni loĝis kune en la domo de gimnazia instruisto en la proleta kvartalo „Konjovica“ (nun ĝi estas urboparto de Sofio nomata „Georgi Dimitrov“). Nia dommastro ne konis nian faktan agadon en la revoluciaj sindikatoj, ĉar ni prezentis nin oficiale kiel studentojn. Sed iun tagon la polico arestis Anĝelon en la kancario de la sindikatoj kaj sendis lin en la malliberejon pro lia agado de revolucia ĵurnalisto. Mi alportis en la malliberejon liajn litkovrilojn kaj vestojn, klarigante samtempe al la dommastro, ke mia kamarado forveturis al la provinco ĉeesti geedziĝon de sia parenco kaj tie li restos por prepari siajn universitatajn ekzamenojn, sed mi estas preta ankaŭ porestante pagadi la luprezon por ambaŭ. Tiam por mia plej granda surprizo la dommastro respondis: „Mi eksciis el la gazetaro, ke via amiko estas arestita kaj nun troviĝas en la centra malliberejo de Sofio. Ne necesas pagi lian parton de la luprezo, sed atentu, ke oni ankaŭ vin ne malliberigu.“ La dommastro kaŝis de sia edzino kaj filoj la veron pri la areŝto de Anĝelo.

Anĝelo edziĝis al Trajna Spasova. Kun sia kamaradino li laboris tre aktive por la prospero de nia Esperanto-afero. Mi memoras multajn faktojn pr

la sindona Esperanto-agado de Anĝelo, kiu estis preta plenumi ĉiun taskon, eĉ la plej riskoplenan. Junaj kaj maljunaj estis ravitaj de lia sindonemo kaj abnegacio. Jen li gvidas kursojn, jen li preparas artikolon de la Laborista Esperanto-Asocio, jen li mem kun Trajana kaj aliaj geesperantistoj partoprenas disvendadon de niaj presorganoj. Malfacile estas montri la multflankan ĉiutagan poresperantan laboron de Anĝelo. Post la malpermeso de laŭleĝa funkciado al la Laborista Esperanto-Asocio Anĝelo kun la ceteraj aktivuloj de LEA okupiĝis pri la sama agado en la vicoj de Bulgara Esperantista Asocio, kiu restis laŭleĝa ĝis 1942 j.

Anĝelo estis plena de klasa malamo al la sociordo de kapitalismo kaj faŝismo, al la malhumanaj sufokantoj de ĉiuj progresemaj iniciatoj de nia bona popolo, li konservis sian kuraĝon eĉ en plej malfacilaj kaj pezaj momentoj de la batalo. Pro lia laboro en la redakcio de la centra organo de l' revoluciaj Sendependaj Laboristaj Sindikatoj (NRPS), oni lin arestadis, batadis, persekutadis, tamen li ĉiam havis la konduton de vera komunisto. Kiam poste Anĝelo fariĝis redaktoro de la bulgarlingva eldono de Laborista Esperantista Asocio (Internacia Laborist-Kampana Korespondanto), li daŭrigis firme la batalon kontraŭ la cinika sinteno de la faŝista cenzuro al la ĵurnalistoj de nia progresema gazetararo.

Neniu persekutado povis malesperigi Anĝelon. Post kiam la revoluciaj sindikatoj estis malpermesitaj kiel laŭleĝa

organizaĵo, li daŭrigis sian agadon en la eksterleĝa kontraŭfaŝista movado. Li plifortigis sian aktivecon, kiam la hitleraj hordoj invadis nian landon. En tiu batalo kontraŭ la faŝistaj barbaroj li kun grupo da kuraĝaj patriotoj estis arestita kaj sisteme torturita en la policaĵ kazernoj. Post daŭra inkvizicio li estis ĵetita en la centran malliberejon kun serioze difektita sanstato. Nur post kelkaj monatoj li mortis en la hospitalo de la malliberejo la 13-an de junio 1942. Ĝis sia lasta spiro li ne perfidis al siaj komunistaj ideoj kaj senŝancele kredis en la fina venko de Bulgara Komunisto Partio super la malamikoj de la popolo.

Kiam oni festis la 70-an datrevenon de la fondiĝo de komunisto organizaĵo en lia naskiĝurbo Oreĥovo, inter la pereintaj por la libero komunistoj estis substrekitaj ankaŭ la nomoj de Anĝelo. Unu el la fabrikoj en Oreĥovo portas la nomon „Anĝelo“. Sed plej inda monumento al tiu, kiu dediĉis sian tutan konscian vivon al la batalo por pli hela kaj feliĉa estonteco de sia popolo, por internacia kompreniĝo kaj paco inter la popoloj, por konstanta firmiĝo de la amikeco de nia popolo kun la multnacia popolo de Sovetunio, estas la disfloro de nova, socialisma Bulgario kaj de lia naskiĝurbo Oreĥovo.

La popolo neniam forgesos siajn herojn gefilojn!

La bulgaraj esperantistoj neniam forgesos Anĝelon — la sindonan kaj spertan funkciulon de la progresema esperantistaro en nia lando!

Nikola Aleksiev

Eterna gloro al la pereintoj en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo — por libereco, socia justeco, por paco kaj socialismo



Ivan Vasilev Grudev naskiĝis en Stara Zagora la 2-an de julio 1914 en familio, kiu okupiĝis pri ter- kaj ĝardenkulturado.

Li kreskis en modesta laborema familio. Jam etulo li estis helpanto al siaj gepatroj. Grudev estis edukita en amo al laboro kaj li tre ŝatis la librojn. Kiel lernanto li estis sub la forta influo de sia instruisto Prokopiev — bona homo, kiu donis al la malgranda



Ivan la unuajn konojn pri la vivo. En 1930 Grudev estis lernanto en la gimnazio. Tie sur li havis influon la instruistoj Kipro Nikolov kaj Ivan Ivanov. Grudev preferis legi progresemajn librojn. Liaj ŝatataj verkistoj estis Puŝkin, Turgenev, Gorkij k. a. Kiel membro de la abstinula kaj stenografa societoj li laboris aktive kun junula flamo kaj energio. Li preparis prelegojn, organi-

zis kunvenojn, disputis kun la malamikoj de Esperanto.

Ni devas emfazi, ke Grudev en la gimnazio estis unu el la plej bonaj kaj inteligentaj lernantoj, kaj la organiza laboro ne malhelpis, sed tute kontraŭe — stimulis lin. Li ĉiam sukcesis trovi tempon por ĉio.

Eklerninte Esperanton, nur post kelkaj monatoj li komencis korespondi kun progresemaj junuloj el Norvegio, Svedio, Danio, USSR k. a. La korespondado helpis lin ekkoni la junularan movadon kaj fariĝi sindona komsomolano. Sed lian agadon rimarkis la lerneja estraro kaj la polico komencis persekuti lin. Kelkfoje li estis arestita, tamen la inkvizicioj ne sukcesis deflankigi lin de la batalo por justeco kaj libero. La turmentoj hardis lin kiel veran batalanton. Liaj kunlaborantoj estis Vlado Gerĝikov kaj Stojan Bonev, kiuj jam lernantoj elmigris en USSR. Sed plej bona amiko de Ivan estis Atanas Mitev, kiun en 1934 la polico buĉis.

En 1933 Grudev estis eksigita el la gimnazio pro komunista agado. En 1934 li komencis lerni en urbo Haskovo. Kiam li revenis el Haskovo, en monato majo en Stara Zagora okazis fiasko de la Laborista Junulara Asocio (RMS), kies sekretario li estis. La polico serĉis lin, sed li sukcesis kaŝi sin en vilaĝon Enina.

Grudev devis fariĝi eksterleĝa homo. Kune kun Ivan Skerlev, Dimitr Gjoŝev, Petr Rusev kaj Kiril Ĉolakov li vivis kelkajn monatojn en la pinarbaro apud v. Enina. Grudev revis viziti Sovetunio, la unuan socialisman landon. Sed vane! Nokte li kune kun la ceteraj kamaradoj estis murdita la 5-an de julio 1934 de la agente-provokanto Kiril Ĉolakov, kiu loĝis kelkajn monatojn kun la eksterleĝaj junaj komunistoj.

Tiel finiĝis la belega vivo de Ivan Grudev, modesta, sed heroa batalanto por komunismo kaj paco en la mondo.

D. Martinov



LANDO DE DINAMIKA EVOLUO

Malforta industrio, primitiva agrikulturo kaj popolo premita de siaj kaj fremdaj tiranoj kaj ekspluatantoj. Tia aspektis antaŭ kvaronjarcento Bulgario en la okuloj de la tiutempuloj. Pri tiu postrestado atestas la statistikaj libroj kaj la priskriboj de la ekonomigeografoj. Dum malpli ol 25 jaroj socialisma Bulgario transformiĝis en ŝtaton kun disvolvita industrio kaj moderna agrikulturo laŭ kiuj instruas sin dekoj da landoj.

Dum la jaroj de la popola regado la kolektiva socia produkto ĉe ni naŭobligis. La nacia enspezo kvinobligis. Pli ol 30-foje kreskis la industria produktaĵo, kaj la konsumado pokape de la loĝantaro kreskis 4-foje. Malmultaj estas la landoj en la mondo, kiuj povus laŭdi sin pri tiaj rapidaj tempoj de evoluado.

Dum la jaroj de la popola regado estis fundamente rekonstruitaj multaj branĉoj de la popola mastrumo. Kreitaj estis ankaŭ kelkaj novaj branĉoj, kiel maŝinkonstruado, nigra kaj kolora metalurgio, peza kemio k. a. Nun en la lando funkcias pli ol 200 maŝinkonstruaj uzinoj, kiuj donas produktaĵon por ĉirkaŭ 128 milionoj da levoj jare, kaj la tuta amplekso de l'produktaĵo en 1939 estis ĉirkaŭ 7 milionoj da levoj.

Iuj el la nuntempaj produktaĵoj de la metaltranĉaj maŝinoj estas bone konataj ankaŭ eksterlande. En la mondmerkato ĉiam pli kaj pli gajnas bonan renomon per siaj teknik-ekonomiaj kvalitoj la bulgaraj elektroĉaroj, motoĉaroj, elektrotelferoj, vaporŝipoj k. a. Sukceson havas nia elektron-kalkula tekniko — la kalkulilo „EL-ka“, la diversaj tipoj de skribmaŝinoj „Marica“. Gajnas reputacion la marko de televi-

diloj „Sofia“, „Pliska“ k. a.

Notindajn sukcesojn havas nia lando en konstruado de baraĵlojoj kaj produktado de elektroenergio. Rilate al konstruado de baraĵlojoj Bulgario okupas la unuan lokon en Eŭropo kaj rilate produktadon de elektroenergio pokape de la loĝantaro ĝi antaŭiris evoluintajn eŭropajn landojn kiel Italion, Nederlandon, Hungarion k. a. Jam ekde 1967 la bulgaraj elektrocentraloj produktas pli da elektroenergio ol Turkujo kaj Grekujo kunĉe. Niaj sukcesoj tiurilate multiĝos, ĉar en la tagoj antaŭ la jubilea festo ekfunkcios ankaŭ la tria turbino de la termoelektrocentralo „Varna“. Iom poste ekfunkcios la termoelektraj centraloj „Plovdiv“, „Vidin“ k. a. Samtempe oni komencis konstrui novan 600-megaŭatan elektrocentralon en Bobovdol. Estas konstruata ankaŭ telekondukilo „Bulgario—Moldavia SSR“, per kiu ni aliĝos al la elektroenergia sistemo de Sovetunio.

Pri la sukcesoj de socialisma Bulgario en agrikulturo, peza kemio, internacia turismo, ekstera komerco kaj aliaj branĉoj de la popola mastrumo ni povas rakonti en miloj da paĝoj, ĉar fakte ili estas grandegaj kaj diversflankaj.

Ni, la bulgaroj, estas fieraj, ĉar la vortoj de l'granda filo de nia popolo Georgi Dimitrov efektiviĝis: dum 1—2 jardekoj atingi tion, kion la aliaj popoloj ĉe aliaj kondiĉoj atingis dum jarcentoj. Kaj tio estas garantio, ke nia lando firme marŝos antaŭen. Surbaze de teknika progreso, de modernigo de la popola mastrumo Bulgario okupos inde lokon inter la ekonomie evoluintaj landoj.

Tatjana Evstratieva

La spiritaj fortoj de la bulgara popolo estis longe retenataj de la burĝaj reĝimoj. Tiuj fortoj ĉiam serĉis eliron.

Jam pri la malnova kulturo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov parolis en 1933 antaŭ la faŝista tribunalo en Leipzig jene:

— Jam longe antaŭ la tempo, kiam germana imperiestro Karlo la V diris, ke en germana lingvo li parolas nur kun siaj ĉevaloj, kaj la germanaj nobeloj kaj instruitaj viroj skribas nur latine kaj sin ĝenas uzi la germanan lingvon, en „barbara“ Bulgario la apostoloj Kiril kaj Metodij jam estis kreintaj kaj disvastigadis la malnov-bulgarajn alfabeton kaj kulturon.

La periodo de la 9-a jarcento, kiam vivis Kiril kaj Metodij kaj iliaj disĉiploj, estas nomata ora epoko de nia malnova literaturo. Sed nun ni devas diri, ke vere nova epoko de la kulturo de nia popolo komenciĝis ekde 25 jaroj.

La *instruado* en nia lando fariĝis tutpopola. La fundamenta instruado estas deviga kaj senpaga. En Bulgario ne plu ekzistas analfabetoj malpli aĝaj ol 50 jarojn.

Ĝis 1944 nur 48% de la infanoj ricevis fundamentan instruitecon. Nun tiu ĉi procento estas preskaŭ 100. Antaŭ la popola regado nur unu triono de la lernantoj finis la kurson de la fundamenta lernejo kaj studis plu en pli altgrada lernejo. Nun pli ol 96% daŭrigas sian studadon en gimnazioj, teknikaj kaj profesiaj teknikaj lernejoj. La tutpopola mezgrada instruado estas preskaŭ realigita. En Bulgario ĉiu kvara persono lernas. La instruado de la juna generacio estas unu el la plej grandaj sukcesoj en la lastpasintaj 25 jaroj de popola regado.

Pri la sukcesoj de la instruado plej klare parolas la ciferoj: ĝis 1944 tute mankis gimnazioj kaj teknikaj lernejoj

kun vespera aŭ foresta instruado. Nun en ili estas instruataj pli ol 75 000 laboristoj kaj oficistoj. La nombro de la lernantoj kreskis de 1 074 000 en 1944 al 1 560 710 en 1968 j. La nombro de la instruistoj kreskis de 31 063 al 99 804, kaj de la lernejoj — de 7 485 al 13 688. La nombro de mezgradaj lernejoj kaj de memstaraj gimnazioj en 1944 estis 150, nun ĝi estas 257. Post nelonge ĉiu civitano en nia lando havos kompletan mezgradan instruitecon. En 1944 funkciis nur 65 mezgradaj profesiaj lernejoj kun ĉirkaŭ 20 000 lernantoj, nun ilia nombro kreskis al 407 kun 133 000 lernantoj, t. e. ĝi sesobliĝis.

Impete kreskis la nombro de *altlernejoj*. En la pasinteco ni havis 5 altlernejojn kun 25 fakoj, 433 universitataj instruistoj kaj 10 169 studentoj; nun — 26 altlernejoj kun 161 fakultatoj, 5359 profesoroj kaj instruistoj kaj pli ol 81 000 studentoj. La studentoj pagas nenian kotizon. Ĉirkaŭ triono el ili ricevas stipendiojn. En kapitalisma Bulgario estis preparita neniu inĝeniero. La supera inĝenier-teknika instruado estas ekskluzive frukto de la popola regado. Oni preparis pli ol 40 000 inĝenierojn. Ĉiujare en la altlernejoj estas preparataj pli ol 12 000 fakuloj. En 1939 el ĉiu dekmilo da loĝantoj en Bulgario 16 estis studentoj, en la nuna jaro — 96, t. e. sesobla kresko. En tiu ĉi sfero Bulgario okupas unu el la frontaj lokoj en la mondo.

Grava kriterio pri la kultura nivelo de la popolo estas la *librovendado*, la legado de libroj. Ankaŭ tiurilate en nia lando en la lasta kvaronjarcento okazis vera revolucio. Dum en 1939 pokape de la loĝantaro oni eldonis mezkvante jare 1 libron, nun al ĉiu civitano jare distribuiĝas 5 libroj.

Post la Revolucio en 1944 la originala *artliteraturo* ricevis altan svingon.



La romano okupis sian indan lokon; la bulgaraj verkistoj en monumenta stilo kaj vasta amplekso reproduktis la nunan kaj pasintajn epokojn. Kiel ĉefverkojn oni povas citi romanojn de Dimitr Dimov, Georgi Karaslavov, Dimitr Talev, Emilian Stanev k. a.

Gravajn sukcesojn markis nia poezio, precipe la liriko, kaj aliaj branĉoj de la literaturo.

La venko de la Socialisma Revolucio en Bulgario kontribuis por la vera florado en la kampo de la *teatra arto*. La nombro de la dramteatroj kreskis kelkoble. Nun en la lando funkcias 35 ŝtataj dramteatroj kaj kelkaj pupaj. Krome kreigis pli ol 4000 amatoraj dramkolektivoj.

Bulgario fariĝis lando fama per siaj mondkonataj *operkantistoj*. Per siaj sonoraj, freŝaj, belaj, esprimplenaj voĉoj ili atentigis la alilandan publikon. Sufiĉas mencii la nomojn de la tenoroj Dimitr Uzunov kaj Nikola Nikolov, de la baso Nikolaj Gjaurov k. a.

Gravajn sukcesojn gajnis ankaŭ la bulgara *kinoarto*, kiu antaŭ la Revolucio portis la signojn de krea kaj teknika senhelpeco. La bulgara filmo jam

delonge transpaŝis la landlimojn. Miliono da spektantoj el ĉ. 70 landoj de ĉiuj kontinentoj ricevas konkretan ideon pri nia lando, pri nia nova vivo, pri la karaktero de niaj homoj.

Grandan progreson faris Bulgario en la sfero de l' *scienco*.

La nombro de la *kuracistoj* pligrandigis de 3000 en 1939 al 12 500. Nun Bulgario okupas unu el la unuaj lokoj en la mondo laŭ la nombro de la medicinistoj proporcie al la loĝantaro.

En ĉiuj aliaj kampoj de la kulturo oni povas konstati rapidan antaŭeniron. Estas neeble tamen eĉ kure mencii pri ĉiuj kampoj de kultura agado, en kiuj nia popolo atingis rimarkindajn sukcesojn. Cetere niaj alilandaj amikoj certe estas regule kaj detale informitaj de siaj bulgaraj plumamikoj, kaj ĉe Esperanto-revuoj kiel „Nuntempa Bulgario“, Bulgara Esperantisto“ k. a. pri la gigantaj paŝoj de la libera bulgara popolo en la kampo de la kulturo, pri la grava kontribuo, kiun la bulgaraj kreantoj donas al la trezorejo de la monda kulturo.

As. Grigorov

SANKTA KAJ ETERNA

Socialisma reĝimo en nia Patrolando ekzistas 25 jarojn. Jam en la unua jaro de sia ekzistado ĝi apogis sin al la unua en la mondo socialisma ŝtato — Sovetunio.

Iuj konservativaj ĵurnalistoj nomas nian ŝtaton „satelito de Moskvo“. Ĉu tio veras? Tute ne, kompreneble. Usono kaj la ceteraj kapitalismaj ŝtatoj nature posedas satelitojn, ĉar malgrandaj burĝaj ŝtatoj dependas de ilia kapitalo. Tamen Sovetunio estas ŝtato regata de laboristoj kaj kamparanoj, kiuj neniam emus subpremi kaj ekspluati fremdajn popolojn. Male, la sovetista popolo oferas rimedojn kaj tute senegoisme, tute sincere helpas aliajn popolojn progresi ekonomie kaj kulture.

Jen ekzemple Bulgario. Antaŭ kvaronjarcento ĝi estis satelito de hitle-rista regno. Bulgario estis orienta agrikultura lando, kiu eksportis en Eŭropon nur legomojn kaj fruktojn, grenon kaj lanon, ovojn kaj viandon. Nia malriĉa popolo havis nenian eblecon produkti industriaĵojn. Eĉ pingloj estis importataj el eŭropaj ŝtatoj.

Dum la pasintaj 25 jaroj Sovetunio montris sin kiel plej bona amiko de nia lando. Sovetunio helpis al Bulgario konstrui uzinojn, minejojn, elektrocen-ralojn k. a. Ĝi importis en nian landon milojn da traktoroj kaj diversajn maŝinojn por terkulturado. Tio faciligis la kamplaborojn kaj kreis premisojn por amasa aliĝo al la agrikultu-

SALUTLETERO

al la estraro de la legejo en v. Dve Mogili, distrikto de Ruse, okaze de la 50-jara datreveno de la legejo — 24. V. 1969

Estimata sinjoro prezidanto,

Dum la pasinta majo 1968 mi kun mia edzo vizitis vian vilaĝon kiel gastoj de la lokaj esperantistoj.

Mi vidis la belegan vian Domon de la Kulturo, vian luksan kinosalonon, vian tre bone aranĝitan legejon kun multe da libroj, ĵurnaloj.

Mi vidis multe da gelernantoj kaj geĉivitanoj, kiuj soife legadis, serĉis interesajn teknikajn gvidlibrojn, novelojn, romanojn, ĵurnalojn ktp.

Poste mi vizitis kelkajn de viaj multnombraj novekonstruitaj domoj, provizitaj per akvo, elektro, lavmaŝinoj, televidiloj, modernaj mebloj, belegaj popolaj tapiŝoj, tre puraj kuirejoj, riĉaj florgardenoj.

Jen kie mi vidis la ligon inter la 50-jara agado de la loka legejo, larĝe subtenata de via popola registaro, kaj la renkontita de mi altnivela kultura aranĝo de la hejmoj.

Sen altnivela kulturo estas maleble atingi altnivelan produktadon kaj altan vivnivelon.

Kredu, estimata sinjoro prezidanto, al niaj vlej sinceraj sentoj, al nia admiro kaj eterna amikeco.

Vivu la paco, vivu Bulgario, vivu Francio!

Vivu la amikeco inter niaj du popoloj!

A. Berne, ĵurnalistino el Marsejlo — Francio

raj produktad-kooperativoj. El tio sekvas, ke ne ĉiu potenca ŝtato ekspluatas malgrandajn ŝtatojn. Tion praktikas nur la potencaj burĝaj ŝtatoj. Inter la landoj de la socialisma tendaro kreiĝis rilatoj de amikeco kaj egalrajteco.

Dank' al Sovetunio oni likvidis en nia lando la ekspluatadon de homo al homo kaj por ĉiam ekregis en ĝi la socialisma produktadsistemo.

Similajn sukcesojn rikoltis Pollando, Hungario, Germana Demokratia Respubliko, Ĉeĥoslovakio, Rumanio k. c. dank' al siaj amikaj rilatoj al Sovetunio.

Kompreneble, imperiistaj ŝtatoj ne observis indiferente nian supreniron al socialismo, ĉar tio povus instigi ankaŭ aliajn popolojn sekvi la ekzemplon de la popolaj respublikoj.

La ĉefaj imperiistaj ŝtatoj kaj iliaj satelitoj unuiĝis en agresiva bloko NATO kun celo prepari militon kontraŭ Sovetunio kaj la ceteraj socialismaj ŝtatoj. Tio instigis la minacatajn landojn kontrakti por sia defendo. Tiel naskiĝis la Pakto de Varsovio. Dank' al ĝi la paco en Eŭropo estas konser-

vata. Dank' al ĝi pasintjare estis malebligita la kontraŭrevolucia renverso en Ĉeĥoslovakio. Dank' al ĝi la popoloj en la socialismaj landoj daŭrigas en paco la konstruadon de la nova vivo.

La pacama politiko de la socialismaj ŝtatoj, unuiĝintaj en la Varsovia Pakto, manifestiĝas en la propono kunvoki tuteŭropan konferencon, kie oni pri diskutu tute libere la problemojn pri paca kunekzistado de ŝtatoj kun diversaj sociordoj kaj pri ekonomia kunlaboro.

Nur en mallonga periodo de 25 jaroj Bulgario okupis indan lokon en Eŭropo. Inter la balkanaj landoj ĝi staras en la unua vico laŭ sia ekonomia potenco.

Nia lando ŝuldas sian progreson al la komuneco de la socialismaj ŝtatoj. Tial ĝi restos por ĉiam fidela kaj memvola aliancano de Sovetunio kaj la ceteraj socialismaj ŝtatoj.

Kiel por nia popolo, tiel ankaŭ por ni, bulgaraj esperantistoj, nia socialisma komuneco estas egala, sankta kaj eterna.

Hr. Gorov

LA TUTMONDA PAC-ASEMBLEO MARKIS NOVAN ETAPON

EN LA PORPACA BATALO

En Berlino, la ĉefurbo de la pacama Germana Demokratia Respubliko, okazis la 21-an — 24-an de junio zorgeme preparita Tutmonda Pac-Asembleo.

Eble iu, kiu konas la evoluon de la tutmonda pacmovado, povas ekpensi, ke similaj manifestigoj estis organizitaj ne unuafoje. Sed tamen la atentema observanto tuj konstatas, ke laŭ sia preparo kaj karaktero la Berlina Pac-Asembleo estis unika en sia speco.

Antaŭ ĉio, la organizado estis farita de speciala Preparkomitato, kiu konsistis el reprezentantoj de multaj internaciaj kaj naciaj pacmovadoj kaj pacorganizanoj, inter kiuj ekzistas sufiĉe seriozaj diferencoj en la formoj kaj metodoj de la porpaca batalo. Ja ĉiu scias, ke ne ekzistas en la mondo unusola porpaca movado. La bildo de la pacmovadoj estas tre pitoreska kaj riĉa je propraj al ĉiu el ili stilo kaj metodo de agado. Ne malofte iliaj konceptoj pri gravaj problemoj aŭ eventoj lige kun la pacbatalo estas eĉ kontraŭaj.

Kaj tre gravan signifon havus, se iu povus preni la iniciaton kunvoki en unu loko la grandegan plimulton el tiuj diversaj pacmovadoj por amika interŝanĝo de konceptoj, opinioj kaj spertoj. Eĉ se oni ne atingus nepre unuecan starpunkton pri ĉiuj tuŝitaj problemoj, la utilo de simila renkontiĝo estas evidenta. Ĉar nenio povas helpi pli valore la kreon de komuna starpunkto (almenaŭ pri kelkaj problemoj) ol anticipa libera pridiskuto, kiu riĉigas ĉiun partoprenanton, kaj poste en la komuna batalo por realigo de la akceptita agadprogramo oni pli rapide povus veni al unueco ankaŭ pri demandoj ĝis tiam nesolvitaj.

Se oni juĝos realisme, Tutmonda

Pac-Asembleo estas bezonata nome pro la ekzistanta en la pacmovado diverseco de tendencoj kaj konceptoj. Oni devas danki al la Tutmonda Pac-Konsilio en Helsinki, kiu prenis la iniciaton pri tumonda renkontiĝo de ĉiuj pacamaj fortoj. Ke TPK bone orientigis kaj ĝuste agis, oni povas konstati laŭ la rezultoj. Vere, ekzistis seriozaj malfacilaĵoj laŭ tiu vojo, iam eĉ ŝajne nesupereblaj. Tamen venkis la bona volo al plifortigo de la pacmovado pro la gravaj minacoj sisteme direktataj al subfosado de la tutmonda paco flanke de la imperiismaj rondoj.

Oni povas esti kontenta pri la spirito, kiu regis en la Asembleo. Ĝenerale la problemoj estis diskutitaj en atmosfero, kiu certigis al ĉiu parolanto eblecon trankvile kaj sen ia ajn ĝeno argumenti sian pozicion. Estis tre grava la fakto, ke centoj da organizaĵoj kaj movadoj el ĉiuj kontinentoj povis kvar tagojn afereme kaj serioze studi ĉiuflanke la diversajn aspektojn de la pacproblemoj.

Oni devas emfazi, ke la Asembleo traktis **ĉiujn** esencajn pactemojn: Vjetnamio; la Eŭropa sekureco; la Mezorienta problemoj; koloniismo, novkoloniismo kaj nacia sendependeco; malar-mado. Estas memkompreneble, ke en la diskutoj reliefigis la diverseco de opinioj. Sed la plej ĝojinda fakto estas la strebo al unueco, ne al eternigo de la diferencoj. Kaj nome tio estas plej necesa por la kooperado de la pacfortoj kaj por plialtiĝo de ilia kapableco gvidi sukcesajn luktojn por la paco. Nur tiamaniere, per unuigitaj fortoj, oni povas pli trafe kontraŭstari al la agresema politiko de la imperiistaj rondoj kaj certigi la fiaskon de ilia dangelega por la homaro militinstiga agado.

Ni povas raporti al la esperantistaro,

ke la Berlina Pac-Asembleo plenumis digne siajn taskojn. Ĝi donis sian grandan kontribuon por la unuiĝo de la pacfortoj kaj respondis al unu treege akra bezono de la homaro. Sufiĉas nur montri, ke la Asembleo sukcesis altiri al kunlaborado reprezentantojn de 56 internaciaj kaj de 320 naciaj pacorganizaĵoj el 101 landoj. Entute pli ol 1100 delegitoj de tiuj pacorganizaĵoj kaj movadoj partoprenis tre aktive la laboron de la Asembleo kaj ĝiaj kvin komisionoj (kun multaj subkomisionoj).

La unuanime aprobitaj Alvoko de la Asembleo kaj Rezolucio pri Vjetnamio

montris okulfrape, ke la renkontiĝo de la pacfortoj en Berlino donos novajn impulsojn al la pacbatalo en la tuta mondo.

Tion oni nome celas por konservi la vivon kaj la kulturon de la homaro.

Ni, la esperantistoj, notinde MEM-anoj, aktive partoprenis tiun noblan pacmanifestiĝon kaj ni fieras pri ĝiaj rezultoj (Aparte ni donas informon pri la agado de MEM-delegitaro).

Nun per ĉiuj fortoj ni agu sub la signo de la „spirito de Berlino“!

Pacaktivulo

LA DELEGITARO DE MEM EN LA BERLINA PACASEMBLEO

En la nomaro de internaciaj pacorganizaĵoj, kiuj laboris dum monatoj por la brila sukceso de la Tutmonda Pac-Asembleo en Berlino, figuris ankaŭ Mondpaca Esperantista Movado. Tiu fakto trovis lokon en la dokumentoj de la Asembleo, ĝin publikigis la gazetaro kaj la televido. La prestiĝo de MEM forte gajnis rezulte de la kamaradeca kunlaboro kun la neesperantistaj pacmovadoj kaj organizaĵoj. Por la sukcesa preparlaboro multe kontribuis pacamikoj A. Balague, R. Graetz kaj D. Blanke.

La delegitaro de MEM konsistis el la jenaj pacamikoj: A. Balague (Aŭstrio), W. Gilbert (Francio), R. Graetz (GDR), K. Gusev (USSR), T. Balda (USSR), L. Marton (Hungario), L. Kosieniak (Pollando) kaj N. Aleksiev (Bulgario) - gvidanto de la delegitaro.

La delegitaro de MEM estis ne nur reprezenta, sed ĝi aktive partoprenis la tutan laboron de la Asembleo. La gvidanto de la delegitaro estis en la Prezidentaro de la Asembleo. Li ĉeestis la kunsidojn de la Komisiono pri koloniismo, novkoloniismo kaj nacia sendependeco kaj partoprenis en la diskutoj ĉe la subkomisiono pri novkoloniismo. A. Balague kaj L. Kosie-

niak partoprenis la laboron de la komisiono pri Eŭropa sekureco, kie Balague faris paroladon. En la Komisiono pri Proksima Oriento partoprenis D-ro L. Marton kaj R. Graetz, kie la unua faris paroladon. En la komisiono pri Vjetnamio parolis W. Gilbert kaj en la komisiono pri Malarmado ĉeestis T. Balda kaj K. Gusev. Estis formita speciala Esperantista laborgrupo (vice kun laborgrupoj de sindikatoj, vilaĝanoj, virinoj, parlamentanoj, juristoj, instruistoj, kulturagantoj kaj scienculoj). Je la nomo de nia laborgrupo N. Aleksiev faris koncizan raporton antaŭ la konkluda plenkunsido de la Asembleo.

Post la fermo de la Asembleo multaj MEM-delegitoj partoprenis ekskursojn kaj vizitis vidindajn urbojn de GDR, kie konatiĝis pli detale kun la sukcesoj de GDR kaj kun la paca strebado de ĝia loĝantaro.

Resume: MEM eliris sur la larĝa vojo al kunlaborado kun gravaj neesperantistaj pacmovadoj, kaj tio donos novan impulson al niaj pacamikoj ĉie en la mondo. Nun ni gvidu nian paclaboron sub la signo de la Berlina Asembleo!

N. A.



„Bulgara Esperantisto“ ludas gravan rolon por la propagando kaj disvastigo de nia Movado. Do, ĝi estas propagandanto, disvastiganto kaj organizanto de la Lingvo Internacia. Se ni foliumos la paĝojn de la malnovaj jarkolektoj, ni vidos kiom da plej diversaj kaj plej variaj materialoj estis publikigitaj. El ili ni povos ĉerpi abundan materialon por la historio de la Bulgara Esperanto-Movado, por la Movado en aliaj landoj kaj ankaŭ por la ĝenerala E-Movado. Krom tio ni havos la eblecon



vidi, kiamaniere laboris la diversaj redaktaj komitatoj kaj speciale la ĉefredaktoroj. Ni vidos, ke iuj el ili turnis atenton al la kulturklerigaj problemoj, aliaj — pli speciale al la literaturaj, triaj — al la organizaj. Sed ni devas substreki, ke plej multaj paĝoj estis dediĉitaj al la propagandaj kaj organizaj materialoj, kaj tio multe helpos tiujn niajn amikojn, kiuj dediĉos sin al

verkado de kompleta historio de nia Movado.

En la daŭro de kvar jaroj (1964—1968) mi estis ĉefredaktoro de la revuo. Multan tempon mi dediĉis por inda plenumado de tiu respondeca tasko. Mi profitas la okazon esprimi mian dankon al miaj amikoj el la redakta komitato — Atanas Lakov kaj Simeon M. Simeonov, kiuj obstine kaj diligente kontribuis en la delikata sfero de beletro kaj poezio. Dank' al iliaj talentoj kaj multflankaj kapabloj la abonintoj ricevis legindajn materialojn. Mi opinias, ke necesas esprimi dankon ankaŭ al k-do Nikola Aleksiev, prezidanto de nia Asocio, kiu multon kontribuis en plej diversaj kampoj, speciale en sfero de planado kaj verkado de la ĉefartikoloj — gravaj eroj en nia organo kaj Movado.

Nun la redaktado de nia organo troviĝas en la spertaj manoj de novaj kaj junaj membroj de la Redakta Komitato. Ni vidas, ke ili komencis vigle labori: la rezultoj estas jam videblaj kaj nediskuteblaj.

Miaj rekomendoj al ili kaj speciale al la ĉefredaktoro k-do Kunĉo Vălev estas ne multaj, sed mi esperas, ke ilin li havos antaŭvide en sia respondeca laboro por atingi pli da rimarkindaj rezultoj.

La unua kaj ĉefa rekomendo estas: pli intima kaj proksima kunlaboro kun la Estraro de la Asocio kaj speciale kun la prezidanto de la Asocio, kiu havas grandan sperton kiel malnova ĵurnalisto.

Oni devas turni specialan atenton al la bonvolaj kunlaborantoj de la organo el la tuta lando, kiuj kiel diligentaj abeloj liveras ĉiutage materialojn por la historio de nia Movado. Necesa estas amo, toleremo kaj obstina laboro sur la manuskriptoj, ĉar ne ĉiam

La materialoj estas bone verkitaj.

La materialoj devas esti variaj, ili devas respeguli la staton de la Movado. Sed oni devas ĉerpi ankaŭ materialojn el la literaturo kaj el diversaj E-revuoj. Tio estas tre grava informfonto por la legantoj de nia revuo.

Oni ĉiam devas apliki la kolektivan metodon de laboro. Tiudirekte oni atingos belegajn rezultojn, se de tempo al tempo oni konsultos la legantojn pri la enhavo kaj pri la taŭgeco de la materialoj.

TUTMONDA FILATELA EKSPOZICIO EN SOFIO

Komence de junio en Sofio okazis la plej granda filatela evento de 1969 — la tutmonda filatela ekspozicio „Sofio 1969“. Ĉi tie la urbanoj kaj la gastoj de la ĉefurbo havis eblecon konatiĝi kun pli famaj poŝt-markkolektantoj el 84 landoj. La ekspozicion partoprenis 998 ekspoziciantoj. Pri ĝia grandeco parolas la jeno: se oni retenus sian rigardon nur 5 sekundojn sur ĉiu el la 1 280 000 poŝtmarkoj, oni devus resti en la ekspozicio 228 tagojn po 8 horoj tage, la ekspozicio do devus daŭri ĝis la 10 de januaro 1970.

La ĵurio aljuĝis la grandan honorpremion al Stig. Longren (Svedo). La grandan nacian premion (konkursan klaso) ricevis d-ro Teodor Popov Velislavov (Bulgario). Honorpremioj estis donitaj ankaŭ al Mario Nuti (Italio), G. Fotiadis (Grekio), Horst Knap (GFR) kaj H. M. Galvex (Ĉilio). La ĵurio aljuĝis 19 grandajn or-medalojn, (3 por ekspoziciantoj el Svedio, po 2 al Ĉeĥoslovakio, Japanio kaj Italio k. a.) kaj 35 malgrandajn or-medalojn (Italio — 5, Svisio — 4, Nederlando — 3, GFR — 3, Pollando 2, Anglio — 2, Bulgario — 2, ĈSSR — 2 k. a.). Estis aljuĝitaj multaj orumitaj, arĝentaj kaj bronzaĵoj medaloj kaj diplomoj.

La filatelan ekspozicion partoprenis ankaŭ poŝtmarkkolektoj kun Esperanto-temaro. Kelkaj el ili estis premiitaj: per arĝenta medalo — la kolekto „Historio de la Internacia Lingvo Esperanto“ de Bartošik Adolf (ĈSSR) kaj per bronzaĵoj medaloj la kolektoj „Per Esperanto tra la mondo“ de Penko Petrov (Bulgario), „Esperanto“ de Burmajster Rudolf (GDR), kaj „Esperanto“ de Majer Fridrih (GFR), per diplomoj — la kolekto de Aloizi Venclevski (Pollando).

Dum la ekspozicio la Bulgara Ministerio de l' Komunikado aranĝis transportadon de poŝtaĵoj el la haloj de l' ekspozicio al la Centra Poŝtejo per poŝtveturilo, uzita je la fino de la pasinta jarcento kaj per la unua aŭtomobilo ĉe

Por tio oni povas organizi pridiskutojn, ne nur distriktajn kaj grandsocietajn, sed eĉ individuajn, komisiante al apartaj personoj doni sian kompetentan opinion.

Al la ĉefredaktoro kaj al la ceteraj membroj de la Redakta Komitato mi deziras sanon kaj obstinon por sukcese daŭrigi la respondecan laboron por novaj sukcesoj de nia nobla Movado.

Miaflanke mi promesas laŭ miaj kapabloj ĉiamaniere helpi la pli bonan redaktadon de nia revuo.

ni de 1905. La 5-an de junio — la Tagon de la Filatelisto — estis demonstrita transportado de poŝtaĵoj per speciala balono „Marko Polo“, disponita flanke de la Nederlanda Aermuzeo.

La 6—7-an de junio okazis la 8-a kongreso de l' Internacia Asocio de la filatelaj ĵurnalistoj. La lasta tago de l' ekspozicio estis dediĉita al la paco kaj la amikeco inter la popoloj.

Post la fermo de l' ekspozicio (9—11 -an de junio) okazis la 38-a kongreso de FIP (Internacia Filatela Organizaĵo).

La tutmonda filatela ekspozicio „Sofio 1969“ estis organizita je tre alta nivelo, eble plej bone ol ĉie ajn ĝis nun. Ĝi estis manifestiĝo de amikeco, paco kaj kunlaboro inter la popoloj el la tuta mondo.

Lasto Nikov

JUNULOJ, KORESPONDU KUN NI!

La Junulara Esperanto-Klubo en Taŝkento, celante apogi kaj disvolvi siajn rilatojn kun esperantistoj el tuta mondo, establis Internacian Korespondan Servon.

La Korespondanta Servo sin turnas al la alilanda junularo kun peto starigi amikan korespondadon kun ni. Siavice ni respondos al ĉiuj skribontoj kaj indikos adresojn de taŝkentaj kaj aliaj esperantistoj, dezirantaj korespondi.

Ni petas vin informi nin pri via plena nomo, hejma adreso aŭ adreso de via klubo (en okazo de kolektiva korespondado), aĝo kaj sekso, ŝatokupoj, temoj de korespondado, kion vi deziras interŝanĝi.

Nia adreso: **Junulara Esperanto-Klubo (Korespondanta Servo), abon. jaŝĉik 140, Poŝtamp, Taŝkent, Uzbekio, USSR.**



1968—69 lernojaro de Esperanto forpasis, kaj ni estas antaŭ la sojlo de la nova 1969/70 lernojaro. Ni, la estraro de Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“, dezirus dividi nian sperton en la instruado de Esperanto kun la geesperantistoj diverslokaj.

La pasintan jaron, longe antaŭ la nova lernosezono, nia estraro en speciala kunsido pridiskutis la rezultojn de nia laboro en la instruado de Esperanto dum la lastaj 2—3 jaroj, kaj ni trovis ilin tute nekontentigaj. Ni sciis tamen, ke antaŭ kaj post la 48-a UK de Esperanto, okazinta en Sofio en 1963, ni sukcesis organizi ĉe nia Societo po 5—6 esperantaj kursoj kun 150—200 kursanoj dum la jaro. Kaj tamen post kelkaj jaroj la rezultoj malgrandiĝis. Ni komencis kontentigi nur pri 2—3 kursoj dum la jaro.

Kiuj estis la kaŭzoj de tiu nenormala stato?

Iuj estraranoj opiniis, ke la kaŭzoj troviĝas en la malfortiĝinta intereso al nia lingvo kaj al nia Esperanto-Movado. Aliaj riproĉis la Instruistan Sekcion, ke ĝi ne aktiviĝas kaj ne plenumas sian ĉefan taskon — zorgi pri la instruado de Esperanto, ke ĝi ne faras paŝojn antaŭ la Ministerio de Popola Instruado. Triaĵ riproĉis la CK de BEA, ke ĝi nesufiĉe zorgas pri tiuj problemoj. Tamen estis ankaŭ aliaj, kiuj opiniis, ke kvankam povas esti certagrade pravaj similaj asertoj, sed la ĉefaj, veraj kaŭzoj laŭ ili troviĝas en la malforta, nesufiĉa propagando fare de la Societo mem, ke ĝuste pro nia malforta propagando multaj homoj nenion scias pri Esperanto, pri la Esperantista Movado, pri niaj E-kursoj.

Fine la estraranoj konsentis pri la graveco de la lastaj argumentoj. Kaj oni decidis antaŭ la komenco de la lernojaro fari sufiĉan anticipan preparlaboron. Jam dum monatoj aŭgusto-

septembro ni preparis specialajn sciigojn, afiŝojn, utiligis niajn ĉiutagajn ĵurnalojn, Radion Sofio. Efektiviĝis kunlaboro ankaŭ kun la Turista Sekcio. Ni dissendis al ĉiuj niaj membroj specialajn leterojn, per kiuj alvokis ilin agiti inter siaj parencoj kaj proksimumoj pri la Esperantaj kursoj de la Societo.

Vere, ke tiu ĉiufanka propagando kostis al ni ne malmulte da energio kaj mono, tamen ni decidis havi eĉ materialan malgajnon, sed provi, kiaj povas esti la rezultoj. Kaj vere la rezultoj estis tre bonaj. Dum la jaro ni havis riĉan rikolton. Fariĝis klare, ke la sekreto de la sukceso kaŝiĝas en ni mem, en nia bona propagando.

Jen la rezultoj. Post la farita propagando kaj agitado en la komenco de monato oktobro por unu semajno enskribis sin en la kursoj por komencantoj 110 kandidatoj. Tiamaniere formiĝis 4 kursoj por komencantoj. Estis pliaj kandidatoj, sed ni ne havis eblecon malfermi alian kurson pro manko de ejo kaj kursgvidanto.

La kursoj estis 3-monataj, dufoje semajne, po unu horo kaj duono. Ĉiu kursano pagis 7 levojn por la trimonato. Tiamaniere ni ne nur ne malgajnis, sed havis eblecon pagi al la kursgvidantoj kaj por la luo de la salono. Nia praktiko kaj sperto montris, ke kiam la kursanoj pagas por la kursoj ili estas pli rezultodonaj kaj, male, kiam la kursanoj ne pagaŝ, la kursoj ofte disfalas.

Post la fino de la unuaj trimonataj kursoj, ni komencis en februaro duan propagandan kampanjon por malfermo de novaj E-kursoj. Nur por 10 tagoj enskribis sin en la novaj kursoj 70 kursanoj — 50 por komencantoj kaj 20 por progresintoj. Aŭ dum la finiĝinta lernojaro entute ni instruis Esperanton al 180 kursanoj.

Oni povas diri, ke la rezulto dependas antaŭ ĉio de la subjektiva faktoro, de l' aktiveco aŭ malaktiveco de la estraro kaj pli speciale de tiu, kiu estas komisiita zorgi pri la afero.

La malfermo de la kursoj okazis solene. Por la celo ni invitis la sekretario de BEA k-do Iv. Sarafov, kiu per konvena parolado malfermis ilin. Post tio ni utiligis la ĉeeston de gasto el Pollando, por ke li parolu antaŭ la kursanoj, kiuj havis eblecon jam en la komenco de la kurso aŭdi Esperantan parolon. Tio grave stimulis ilin.

La kursgvidantoj estis spertaj en la instruado de la lingvo. Du el la tri estis filologoj. Ili strikte kontrolis la ĉeestadon de la kursanoj en speciala kajero, detale kaj tute zorgeme kontrolis ankaŭ la hejmajn ekzercojn.

Ili zorgis, ke ĉiu kursano fariĝu membro de la Societo kaj abonanto de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“. Pro tio ili ĉiam portis en sia poŝto kvitanĉaron. La kursgvidantoj disponigis al al kursanoj adresojn de alilandaj esperantistoj, dezirantaj ko-

respondi; helpis al apartaj kursanoj skribi leterojn. Unu el la kursgvidantoj akompanis siajn kursanojn ekskurse al monto Vitoŝa. Tio kreis intiman atmosferon inter la kursanoj kaj ili volonte aliĝis al nia Movado.

Kion diri pri nia metodo de instruado? El nia praktiko kaj sperto ni konvinkigis, ke plej rezultodona metodo estas io meza inter la gramatika kaj rekta metodo, t. e. la miksitaj metodo. Ĝi permesas per demandoj kaj respondoj en Esperanto kaj en bulgara lingvo helpi al la kursanoj lerni la lingvon; per legado, rakontadoj ktp. kutimigi ilin memstare paroli kaj legi.

Ĉe la fermo de la kursoj ni ankaŭ aranĝis solenaĵojn. Post mallonga elementa ekzameno ni donis al ĉiu regula kursano ateston. Estis interŝanĝitaj de la kursanoj kaj kursgvidantoj konvenaj salutoj, dankoj, donacaĵoj. Tiu metodo en nia instrulaboro donas efikan aŭtoritaton al nia afero.

Nâno Nanov

Prezidanto de E-S-to „M. Gorkij“

BONA ORGANIZADO — BONAJ REZULTOJ

Neniam ni fergesos la daton 11-a de januaro 1969, kiam solene estis malfermita la miksitaj (foresta-ĉeesta) — Esperanto-kurso por instruistoj de la Sofia Distrikta Komitato de BEA. Tiam la plejmulto de ni unuafoje aŭdis, kia lingvo estas Esperanto kaj kiuj estas la celoj de la E-Movado, unuafoje aŭdis E-vortojn. Poste, en la daŭro de 6 monatoj, ĉi post iom ni ekposedis la fundamentojn de la Internacia Lingvo. Pro tio ni dankas al la DK de BEA kaj speciale al niaj kursgvidantoj Kunĉo Vălev kaj d-ro Stojan Moraresku.

Sed ni ankoraŭ estis malproksime de la necesa lingva nivelo kaj bezonis pluan perfektigadon. Tial ni volonte enskribis nin en la 20-taga somera kurso organizita de la Sofia DK de BEA en Godeĉ (5—24 de julio).

La 4-an de julio ĉirkaŭ 50 geinstruistoj ekveturis de Sofio al la bela subbalkana urbeto Godeĉ. La plejmulto estis el la distrikto de Sofia, sed estis ankaŭ gekolegoj el ĉiuj 4 plej malproksimaj randoj de nia lando — el Tolbuhin, Svilengrad, Vidin, Kjustendil k. a.

En Godeĉ ni trovis tre bonajn kondiĉojn flanke de la loĝantaro kaj la lokaj gvidantoj. Tuj en la formitaj 3 grupoj — komencantoj, progresintoj kaj supera (por E-instruistoj) — ekbolis fervora laboro. Por tio grave kontribuis ankaŭ la cirkonstanco, ke jam en la unua tago la gekursanoj estis tre atente kaj trafe dividitaj je grupoj laŭ sia lingva nivelo. Ĉiuj soife komencis asimili la materialon, majstre instruata de niaj amataj kursgvidantoj Kunĉo Vălev, Maria Angelova kaj Jordan Angelov.



Ĉiu penadis streĉe, neniŭ deziris postresti. Kaj baldaŭ super la kvieta urbeto ekŝvebis niaj viglaj E-kantoj. Specialan okazon konatigi kun la loĝantaro ni havis dum la aranĝita de ni amika renkontiĝo — amuzvespero en la Kulturdomo de la Sindikatoj. Kun tre bona sukceso la gekursanoj prezentis varian belartan kaj muzikan programon en Esperanto kaj bulgara lingvoj.

Nature, la bela amuzvespero finiĝis per viglaj dancoj. Kaj ni, kaj la neesperantista publiko restis tre kontentaj. Ĉi tiu renkontiĝo faris grandan propagandon de nia lingvo inter la loĝantaro de Godeĉ, kiu vidis ke la esperantistoj estas kulturaj, bonaj kaj gajaj homoj, ke la lingvo Esperanto estas tre belsona kaj ... alloga.


En la daŭro de la kurso okazis ankaŭ aliaj agrablaj aranĝoj kaj distroj: vesperoj de la talentoj, banked-renkontiĝo kun la lokaj gvidantoj, kiuj venis gaste al ni frunte kun la prezidanto de la Urba Soveto kaj la sekretario de l' Urba Komitato de BKP, kolektivaj vizitoj de filmoj, ekskursoj (al la Monaĥejo de Razboiŝte kaj la fontoj de rivero Niŝava), promenadoj en la bela ĉirkaŭaĵo k. a. Ĉio ĉi amikigis la gekursanojn kaj proksimigis ilin al la loĝantaro kaj la lokaj gvidantoj. Kaj kiam en la nomo de la kurso kaj de la loka E-Societo „Verda Stelo“ ni faris proponon al la urba Soveto doni al iu strato de la urbo la nomon „Esperanto“, oni tre favore rilatis nian peton: „Esperanto“ estis nomita unu centra placo (antaŭ la gimnazio).


Sed la 20 tagoj rapide forflugis. Jen — proksimigis la decida kontrolo, la ekzamenoj. La gekursanoj tre bone prezentis sin antaŭ la speciala ekzamenkomisiono: 18 personoj ricevis diplomojn pri instruarĵo de Esperanto, 16 — pri ekzameno „L“ (supera lingvokono) kaj 13 — atestojn pri finita elementa kurso de Esperanto. Du el la plej bonaj kursanoj - Dragan Ŝentov el Zlatica kaj Maria Angelkova el Go-

deĉ — ricevis gravajn premiojn de DK de BEA: senpagan veturadon kaj partoprenon en la internacia E-seminario en Szeged (Hungario), 12 gekamaradoj, kiuj ankaŭ havis poenton „ses“, estis premiitaj per la romano „Sub la jugo“ de Iv. Vazov en Esperanto.

Fine de la kurso okazis grava kunveno por pridiskuti la tutan kurslaboron. Oni unuanime esprimis opinion, ke la kurso estis tre bone organizita, la instrunivelo estis alta, kaj la gekursanoj eltiris grandan utilon por si. Estus bone se estonte oni organizu ankaŭ seminarion — superan formon de perfektigado en la lingvo. Bone estus ankaŭ akcepti eksterlandajn esperantistojn-instruistojn en la kurson. Oni faru oficialajn paŝojn antaŭ la Ministerio de Popola Instruado, ke la tempo en la E-kurso estu konsiderata kiel labor-tempo por ĉiu instruisto — kursano el la tuta lando kiel decidis tion la fako

Ekskurse al la Monaĥejo de Razboiŝte





Kolektive tagmanĝi dum la ekskurso — ho, tio estas speciale plezuriga!

„Popola Instruado“ de la Sofia Distrikta Soveto. Pere de la fakoj „Popola Instruado“ oni klopodu ŝanĝi la ignoran rilaton de iuj lernejdirektoroj kaj inspektoroj al nia afero. La diplomitaj jam instruistoj deklaris, ke ekde la komenco de la nova lernojaro ili ekgvidos E-kursojn por lernantoj, gekolegoj-instruistoj kaj civitanoj. Granda entuziasmo kaj deziro al sindona laboro por la progreso de nia kara lingvo Esperanto regis en

ĉiuj koroj. Per konkreta laboro ni montris, ke Esperanto devas esti bona faktoro por la partiotisma kaj internaciisma edukado de la juna generacio, por plialtigo de ĝia tuteca kultura nivelo.

Ni, la instruistoj-esperantistoj el la distrikto de Sofia, kiuj partoprenis la E-kurson en Godeĉ, profunde dankas al la tuta fako „Popola Instruado“ de la distrikta Popola Soveto kaj speciale al ĝia estro k-do Ivan Stankov kaj al ĝia vicedestro k-do Kotov, kiuj morale kaj materiale helpis la organizadon de nia kurso. Ili helpis nin ne nur por ricevi bonan komunloĝejon kaj manĝejon, sed pagis 50% el la elspezoj por ĉiu kursano, pagis ankaŭ al la kursgvidantoj. La Sofia fako „Popola Instruado“ donis ekzemplon al ĉiuj similaj fakoj en nia lando. Ni kredas, ke ĝi ankaŭ estonte ne rifuzos sian helpon. Pere de ĝi kaj la energio kaj iniciatemo de la DK de BEA la miksitaj (forestaj-ĉeestaj) kursoj por E-instruistoj, tute trafa kaj rezultodona formo de preparado de E-instruistoj kaj kursgvidantoj, fariĝu konstantaj. Ĉar bonaj instruistoj kaj kursgvidantoj estas nun la plej necesaj al nia Movado.

*Franc Petkov
instruisto el Zlatica*

DOKUMENTOJ

Multaj esperantistoj interesiĝas pri la organizado de E-kursoj por instruistoj fare de la DK de BEA — Sofio. Ankaŭ en kelkaj lokoj

Distrikta Popola Soveto, Sofio
Fako „Popola Instruado“
Nº VI — 3002/2. XII. 1968 j.

La Internacia Lingvo Esperanto kontribuas por la vasta kultura interŝanĝo de nia lando kun la aliaj landoj kaj ludas gravan rolon en la batalo de la popoloj por paco, amikeco kaj kunlaboro. Pro tiu ĉi kaŭzo kaj pro ĝia facila gramatiko, riĉa vortaro, logika konstruo de la

oni sekvis la ekzemplon de sofianoj (Varna, Ŝumen). Tial ni publikigas la oficialan dokumenton rilate la kursojn.

Ĉi-supre ni donas ankaŭ informon pri la somera ĉeesta kurso, organizita de DK de BEA en Godeĉ (pri la foresta kurso vidu raportaĵon en Nº 2 „BE“ — 1969).

Al la direktoro de
lernejo
urbo (vil.)
Sofia distrikto

frazo kaj belsoneco multaj sciencistoj kaj lingvistoj rekomendas ĝian lernadon. La posedo de Esperanto helpas la pli rapidan kaj bonan lernadon de la naciaj lingvoj.

Laŭ programo de la Ministerio de Popola Instruado en nia lando la Internacia Lingvo



Esperanto estas instruata fakultative en kelkaj superaj lernejoj: Sofia Universitato, Supera Ekonomia Instituto en Svištov, Supera Ekonomia Instituto kaj Supera Maŝin-elektroteknika Instituto en Varna. Relative pli vaste ĝi estas instruata en mezaj kaj fundamentaj lernejoj en la distriktoj de Vraca, Miĥajlovgrad, Plovdiv, Kjustendil, Blagoevgrad k. a. kaj laŭ la sistemo de foresta instruado — en centoj da loĝlokoj.

En Sofia Distrikto la instruado de Esperanto estas tute nesufiĉa ĉefe pro manko de instruistoj kaj kursgvidantoj.

Fako „Popola Instruado“ ĉe la Sofia Distrikta Soveto, la Distrikta Komitato de Bulgara E-Asocio kaj la Distrikta Komitato de l'Asocio de Bulgaraj Instruistoj interkonsentis per komunaj klopodoj organizi laŭsisteman laboron kun la instruistoj dum 1968/69 lernejararo por preparo de instruistoj kaj kursgvidantoj de Esperanto. Por tiu celo estos organizitaj du kursoj.

La unua kurso estas destinita por komencantoj laŭ la sistemo de foresta instruado. La lecionoj por memstara lernado estas sendataj per la poŝto. Por pli bona kaj korekta ekposedo de la materialo, post ĉiuj 4 forestaj lecionoj okazos ĉeestaj okupoj en Sofio. La kurso daŭros 6 monatojn. Ĝia malfermo okazos la 10-an de januaro 1969 en la Sofia Universitato.

La kotizo por tiu ĉi kurso estas 8 levo.

La dua kurso estos perfektiga, 20-taga. Ĝi okazos en la someraj ferioj kaj ĝin partoprenos tiuj, kiuj finis la unuan kurson. La finintoj de la dua kurso faros ekzamenon por instruarĵo de Esperanto.

Estro de fako „Popola Instruado“:
Iv. Stankov

Ambaŭ kursoj estos gvidataj de Kunĉo Vălev — instruanto de Esperanto en la Sofia Universitato, sub la kontrolo de fako „Popola Instruado“ ĉe Distrikta Popola Soveto kaj per la helpo de Bulgara E-Asocio kaj la Asocio de la Bulgaraj Instruistoj.

Por ke oni pli bone ekkonu la karakteron, la signifon kaj la celojn de la Internacia Lingvo, same kiel la organizadon de la kursoj mem, la 12-an de decembro j. k. je la 18 horo okazos konferencoj kun la instruistoj en la urboj Botevgrad, Elin Pelin, Ĥrtiman, Pirdop, Svoĝe, Samokov kaj Slivnica, antaŭ kiuj parolos senditoj el la DK de BEA — Sofio.

Tiujn konferencojn devas ĉeesti la direktoroj kaj la prezidantoj de la profesiaj komitatoj el ĉiuj lernejoj en la regiono de la komunumo. La inspektoroj de klerigo kaj kulturo en la menciitaj urboj estas devigitaj certigi salonojn kaj kondiĉojn por sukcesa okazigo de la konferencoj.

Ĝis la 20 de decembro la direktoroj kaj la prezidantoj de l'organizaĵoj de la Instruista Asocio en la lernejoj de la distrikto aranĝu nelongedaŭrajn konferencojn kun la instruistoj en siaj lernejoj kaj enlistigu la kandidatojn; ĝis la 22 de decembro la nomaroj de la enskribitoj kun ĝustaj adresoj estu senditaj en la Distrikta Popola Soveto, fako „Popola Instruado“. Ĝis la sama dato la kolektitaj kursokotizoj estu senditaj al la DK de Bulgara E-Asocio, Sofio, bul. Ĥristo Botev 97 pere de ĉekkonto N^o 2553 — Ŝtata Ŝparkaso de Departemento „D. Blagcev“ — Sofio.

Prezidanto de DK de Asocio de Bulgaraj Instruistoj: T. Iliev

ESPERANTO-KURSO DE LERNANTOJ EN POPOVO

Dum la ĵus pasinta lernejararo ĉe la agrikultura lernejo en Popovo funkciis kurso de Esperanto. Partoprenis 28 ĝelernantoj, kiuj sukcese finis ĝin. Ili preparis programon dediĉitan al la glora 25-a datreveno de la Socialisma Revolucio en nia lando kaj partoprenis la IX Festivalon de BEJ en Ĥaskovo.

La gekursanoj komencis jam korespondadon kun ĝejunuloj el diversaj landoj. Fatme Bilja-

VERDA TABULO

BONAJ REZULTOJ EN ŜIPKA

E-Societo „Ŝipka“ en vilaĝo Ŝipka, distr. de Stara Zagora, disvolvis bonan kaj laŭplanan laboron, sekve de kio ĝiaj membroj kreskis de 25 por 1968 al 45 por 1969 — ĉiuj regule pagintaj sian membrokotizon por 1969.

St. K.

lova ricevis la unuan leteron el Hungario, tial ŝi estis tre feliĉa kaj kontenta. La kurson gvidis Dimitr Canev.

D. Canev



La novaj ĝeesperantistoj el Popovo kun sia gvidanto





LA LERNANTOJ-ESPERANTISTOJ EN ARDINO MANIFESTACIAS

La 24-an de Majo — nia tutpopola festo de Kiril kaj Metodij, festo de la bulgara klerigo kaj de la slava skribo — en Ardino okazis granda manifestacie. Manifestaciis la lernantoj kun siaj amataj instruistoj. Inter la festaj homkolonoj ĉi-jare estis speciala kaj tre impona grupo — la lernantoj-esperantistoj el gimnazio „Georgi Dimitrov“. Ĉiu esperantisto havis sur sia brusto grandan verdan stelon, kiu estis de malproksime rimarkebla. La sloganoj kun tekstoj en bulgara lingvo kaj en Esperanto allogis la atenton de la publiko.

Pasante apud la oficiala tribuno la esperantistoj skandis Esperantlingve kaj ĉi longe aplaudis ilin. Ofte ni aŭdis salutojn el la publiko: „Vivu la internacia lingvo Esperanto!“, „Vivu la lingvo de la paco!“

N. Bojaĝiev

EL LA HISTORIO DE NIA E-MOVADO

BATIŜNICA — LA UNUA EN BULGARIO

Estas io, kio diferencigas la loĝantojn de vilaĝo Batiŝnica, situanta 35 kilometrojn sude de Ruse, ĉe la fervojo. Tio ĉi estas ilia natura inteligenteco, senlaca laboremo kaj rara progresemo. Ili estis unuaj en la batalo kontraŭ la faŝisma jugo kaj unuaj en la socialisma rekonstruado de la vilaĝo.

Necesis nur unu fajrero por ekflamigi E-Movadon en Batiŝnica. Tiun ĉi fajron alportis en la vilaĝon la instruisto Stefan K. Mandov el Kazanlâk en 1924 j. Facile li organizis E-kurson por ĝelernantoj kaj junaj vilaĝanoj. Inter la unuaj kursanoj estis Dimitr Novakov Bârdarov, tiam metilernanto, rare inteligenta vilaĝano. Post la fondiĝo de E-societo „Vilaĝa Voĉo“ (1929) en Batiŝnica — la unua en Bulgario vilaĝa E-societo — li gvidas la E-Movadon tie ĝis nun.

En la sekvantaj kelkaj jaroj esperantistiĝis la fratoj Georgi kaj Ĥristo Damjanov, unu turko — Taĥir Zekiŝev — kaj la mahometana ekleziulo Hoĝa Eŝerif Mollov. Poste en la vicoj de la esperantistoj eniris Grozju Kosev, Asen Ivanov, kiuj ludis kaj ludas gravan rolon en la socialisma konstruado de la vilaĝo post la 9-a de septembro 1944.

Tio ĉi estas la maljuna gvardio de la E-Movado en Batiŝnica.

En ĉiuj niaj renkontiĝoj, kunvenoj, konferencoj kun granda plezuro ni aŭskultadas niajn amikojn el Batiŝnica pro ilia flua senerara enhaviĉa E-parolado. La plejmulto de tiuj ĉi

homoj finis nur kvar klasojn en la elementa lernejo — ankoraŭ unu pruvo pri la facileco de Esperanto.

Nun mi deziras konfesi, kio instigis min skribi pri Batiŝnica.

Tio estis la partopreno de k-do Georgi Damjanov el tiu ĉi vilaĝo en la jarkunveno de nia E-societo en Dve Mogili. La frosta tempesta neĝvetero ne malhelpis lin alveni piede. Li s' d's modeste en la angulo de la ĉambro kaj atente aŭskultadis la parolantajn instruistojn, ekonomiistojn, kuracistojn k. a.

Fine prenis la parolon ankaŭ nia gasto el Batiŝnica, 50—55-jara vilaĝano kun saĝa, esprimplena vizaĝo. Ĉiuj estis agrable surprizitaj. Li parolis pri niaj sukcesoj.

— Mi estas soifa aŭskulti Esperantan parolon dum via jarkunveno. Sed ĝis nun — nek unu vorton, — ekparolis Georgi. Ĉiuj ĉeestantoj estis agrable surprizitaj. Poste li daŭrigis sian paroladon pri niaj nuntempaj sukcesoj kaj pri sia neŝancelebla kredo en la venko de Esperanto. Ĉiuj ŝtorme aplaudis.

Li, la ordinara vilaĝano kun kvarklasa instruisteco, surprizis ankaŭ — kaj kredeble plej multe — la ĉeestantajn universitatulojn kaj sukcesis entuziasmiĝi ĉiujn esperantistojn, ĝekursanojn kaj gastojn.

Jen kio instigis min skribi pri niaj amataj kamaradoj el Batiŝnica.

D-ro Z. B.



Malgraŭ sia relativa juneco, la nuntempa bulgara literaturo posedas verkojn indajn por la tutmonda kultura trezorejo.

Konsiderante la historian atmosferon kaj ĝian evoluon, dum kiuj naskiĝis kaj stabiligis la E-tradukarto en Bulgario, ni povas paroli pri tri konvenciaj periodoj en ĝia evoluo.

La unua periodo komenciĝas de 1902, kiam en revuo „Rondiranto“ aperis la unuaj en Esperanto tradukitaj verkoj el la bulgara literaturo — la rakonto „La unua kiso“ de P. N. Daskalov (trad. T. Kanev) kaj la versaĵo „Patrujo“ de L. Karavelov (trad. B. Ĥrisĉev). Plej ofte tradukata estis la klasikulo de la bulgara literaturo Ivan Vazov. Aperis multaj tradukoj ankaŭ el la verkaro de aliaj elstaraj poetoj kaj beletristoj kiel Aleko Konstantinov, Elin Pelin, Georgi Stamatov, Stojan Miĥajlovski k. a. Jam tiam elkreskis du el la plej grandaj bulgaraj E-tradukistoj — la estontaj E-akademianoj Ivan Krestanov kaj Atanas D. Atanasov — ADA.

Post la Unua Mondmilito komenciĝas la dua periodo (1919—1944). Ĝi estas streĉa kaj malfacila por la tradukistoj pro la multaj kaj seriozaj elprovoj de la E-Movado pro politikaj kaŭzoj. La progresemaĵoj agantoj tamen malgraŭ obstakloj kaj persekutoj eldonis tradukojn el la literaturo kaj dissendadis ilin al multaj landoj de la mondo. Krom tradukado de klasikuloj — Petko R. Slavejkov, Ivan

Vazov, Ĥristo Botev, Penĉo Slavejkov, P. K. Javorov, N. Liliev, Jordan Jovkov k. a., aperis tradukoj ankaŭ el la plej novaj beletristoj kaj poetoj: Georgi Karaslavov, Georgi Rajĉev, Svetoslav Minkov, Ĥristo Smirnenski, Geo Milev, Ĥrisro Radevski k. a. Elkreskis vigla kaj talenta generacio de tradukistoj: Asen Grigorov, Atanas Lakov, Ĥrima, Ivan Dobrev, David Sasonov, Dimitr Zlatarski — Miti, Geo Ĥrĉev, St. Ĝuĝev, Sim. M. Simeonov k. a.

Post la Dua Mondmilito komenciĝas la tria periodo en la historio de la bulgara esperantista traduka literaturo.

La E-Movado donis kaj donas multajn talentajn tradukojn el la verkaro de la plej interesaj klasikaj kaj nuntempaj beletristoj kaj poetoj kiel Ivan Vazov, Ĥristo Smirnenski, Geo Milev, Nikola Vapcarov, Emilian Stanev, Dimitr Dimov, Dimitr Talev, Valeri Petrov, Elicaveta Bagrjana, Blaga Dimitrova, Jordan Radiĉkov k. a.

Plej fruktodonaj estas la tradukistoj Atanas D. Atanasov-ADA, Asen Grigorov, Simeon M. Simeonov, Asen Simeonov, Stefka Ĥristova, Lidia Raeva, Stefan Kiraĝiev, Iv. Sarafov k. a.

Krom en la bulgaraj E-gazetoj pluraj tradukoj el la bulgara literaturo estas dissemiitaj ankaŭ en konataj alilandaj E-gazetoj „Lingo-Internacia“, „Literatura Mondo“, „La Suda Stelo“, „La Nica Literatura Revuo“ k. a.

Bibliografiaj indikoj pri la plej gravaj verkoj

Ivan Vazov, Bulgaraj rakontoj. Trad. At. D. Atanasov — ADA. 1910, 48 p. (Dua eldono — 1913, tria—1923).

Petko Slavejkov, La fonto de la Blankpie-dulino, poemo. Trad. At. D. Atanasov — ADA, Sofia, Kolekto „Bulgara bukedo“ n-ro 1, 1921, 16 p.

Georgi P. Stamatov, Nuntempaj rakontoj. Trad. Iv. Ĥ. Krestanov. Leipzig, 1922, 80 p.

Elin Pelin, La familio Gerak, novelo. Trad. At. D. Atanasov — ADA. Sofia, Esperantista Koopera Societo en Bulgario, 1924, 83 p.

Bulgara antologio, prozo kaj poezio. Kunmetis Iv. Ĥ. Krestanov. Sofia, 1921, 248 p.

Ĥristo Botev, Versaĵoj. Trad. Ivan Dobrev. Sofia, Centra Librejo „Esperanto“, 1928, 48 p.

Ivan Vazov, Novaj bulgaraj rakontoj. Trad. G. Gaŝevski. Sofia, Centra Librejo „Esperanto“, 1928, 62 p.

Ĥristo Smirnenski, Tra la ventego, poemaro. Trad. Asen Grigorov, Atanas Lakov, Ĥrima k. a. Sofia, eld. „Mejdunaroden ezik“, 1931, 48 p.

Geo Milev, Septembro, poemo. Trad. Ĥrima kaj David Sasonov, eld. EKRELO, Moskvo 1931, 32 p.

Georgi Karaslavov, Ĉe posteno, elektitaj rakontoj. Trad. Asen Grigorov k. a. Sofia, eld. „Mejdunaroden ezik“, 1932, 63 p.

Georgi Stamatov, Vilao apud la maro. Esperanta traduko de Ivan H. Krestanov. Ĉina traduko de Kinkemo. Pejpingo, Ĉina Mondlingva Librejo, 1934, 48 p.

Jordan Jovkov, Elektitaj rakontoj. Trad. Ĥr. Iskrov, D. Sasonov, Kruco. Asenovgrad, 1938, 47 p.

Elin Pelin, Kvar rakontoj. Trad. At. D. Atanasov — ADA, Sofia, E-Presejo „Kultura“ 1939, 31 p.

Angel Karaliĉev, La Ponto, rakonto. Trad. N. Vasilev, Sofia, eld. T. F. Ĉipev, 1939, 16 p.

Svetoslav Minkov, La fantaskopo, rakontoj. Trad. Atanas Nikolov, Sevlievo, eld. „Fratego“, 1940, 36 p.

Aleko Konstantinov, Baj Ganjo, fragmentoj el novelo. Trad. Cano Todorov kaj Petro Lovovski, Loveĉ, eld. la tradukintoj, 1941, 48 p.

Geo Milev, Septembro, poemo. Dua eldono, plibonigita. Trad. Ĥrima kaj David Sasonov, Sofio, Bulg. E-Kooperativo, 1946, 32 p.

Ivan Vazov, Avo Jeco rigardas, rakonto, Trad. Krestju Georgiev, Sofia, BEA, 1946, 23 p.

Svetoslav Minkov, La alia Ameriko, rakontoj. Trad. Geo Hršev, Sofio, Bulg. E-Koop., 1948, 110 p.

Elin Pelin, Elektitaj rakontoj. Trad. S. Hesapčiev, Sofia, Bulg. E-Koop., 1948, 96 p.

Ivan Vazov, Vagabondoj, novelo. Trad. Iv. Kovačev, Sofia, Bulg. E-Koop. 1949, 112 p.

Ĥristo Smirnenski, Tra la ventego, poemoj. Dua eldono, plibonigita. Trad. Asen Grigorov, At. Lakov, Ĥrima k. a., Sofia, Bulg. E-Koop. 1950, 80 p.

Georgi Karaslavov, Bofilino. Trad. Sim. Simeonov kaj As. Simeonov, Sofia, Fremdlingva Eldonejo, 1959, 328 p.

Ivan Vazov, Sub la jugo, romano. Trad. Sim. Hesapčiev, Sim. Simeonov ka, Sofia, eld. BEA, 1959, 462 p.

Nikola Vapcarov, Versaĵoj. Trad. Asen Grigorov, Sim. M. Simeonov, At. Lakov, Ĥrima Miti, C. Murgin k. a., Sofia, Fremdlingva eldonejo, 1960, 72 p.

Bulgara prozo, Antologio. Trad. As. Grigorov, S. M. Simeonov, A. D. Atanasov ka, Sofio, Eldonejo de Fremdlingva Literaturo, 1960, 252 p.

Ĥristo Botev, Elektita verkaro. Trad. Ivan Dobrev kaj Ivan Sarafov, Sofia-press, 1961, 86 p.

Venelin Mitev

KARAJ GEESPERANTISTOJ!

La abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ por 1970 j. komenciĝis. Abonu tuj nian asocian organon! Abonigu al ĝi viajn gekonatojn! Ekagu energie kaj senprokraste!

La nomoj de tiuj, kiuj kolektos pli ol 20 abonojn, aperos sur nia honora verda tabulo!



Margreta Nikolova

Du elstaraj nuntempaj bulgaraj estradkantistinoj, kies kantoj en Esperanto sonas en bela gramofondisko kune kun kantoj de Kiril Semov kaj koruso „Esperanto“.

La disko kostas 2,60 levojn (afranko 10%). Mendu ĝin ĉe: Turista Sekcio „Esperanto“, P. K. 45. Sofio, Bulgario.



Mimi Nikolova

TRA LA



MONDO

RENKONTIĜOJ DE MOSKVA E-JUNULARO

Dum la tri unuamajaj festotagoj moskvaj gejunuloj veturis al urbo Ivanovo por renkontiĝi kun tieaj gesamideanoj. La unuan tagon la tuta grupo partoprenis en ekskurso tra la urbo kaj la ĉirkaŭaĵoj. Lokaj esperantistoj konatigis al la gastoj la vidindaĵojn de sia urbo. La sekvan tagon oni aranĝis kunvenon kaj poste partoprenis ekskurson al vilaĝo Paleh, kie vizitis faman muzeon de aplika arto kaj tre interesan antikvan preĝejon, konstruitan en XIII jarcento. Ĉiuj partoprenintoj estis tre kontentaj de la renkontiĝo kaj kiel donacon ricevis la insignon de urbo Ivanovo, kie unuafoje en 1905 estis kreitaj Sovetoj de Laboristaj kaj Vilaĝanaj Deputitoj.

Dum la festaj tagoj de la Venko (9—10 de majo) kelkaj moskvaj gejunuloj veturis urbon Tula, kie kun la lokaj gesamideanoj vizitis la muzeon-rezervejon de Lev Tolstoj en Jasnaja Poljana. En la personabiblioteko de la fama verkisto oni vidis ankaŭ Esperantajn librojn. Dum la kunveno kun lokaj gesamideanoj oni preparolis aktualajn gejunulajn problemojn kaj la preparon por nunjara gejunula tendaro ĉe Karpatio en Aŭgusto.

SUKCESA KULTURA FESTIVALO EN BIALISTOK

La urbo estas unu el la malnovaj urboj de Pollando. Laŭ legendo ĝia fondinto estis litova princo — Gedymin. La unuan historian mencion pri ĝi oni povas trovi en dokumentoj de la jaro 1426. Dum la Dua Mondmilito Bialistok estis preskaŭ tute detruita. Nun tamen ĝi fariĝis larĝa kaj bela urbo kun pluraj lernejoj kaj du altlernejoj.

La urbo de Zamenhof ne forgesis pri sia fama filo: lian nomon portas novkonstruita lernejo, kie infanoj lernas ankaŭ Esperanton. En Bialistok bone agas Rondo de Pola Esperanto-Junularo, la junulara sekcio de Pola Es-

(daŭrigo sur p. 22)

Moskva Internacia Esperanto-Klubo (MIEK) esprimante la volon de siaj anoj, regule ĉiudimanĉe aranĝas vesperojn laŭ ellaborita plano, dediĉatajn al ĉiuj gravaj aktualaj eventoj en nia multflanka kaj interesa vivo. En tiaj vesperoj oni akceptas ankaŭ aliurbajn kaj alilandajn gastojn, al kiuj volonte donas eblecon konatigi la ĉeestantojn kun Esperantaj novaĵoj el ĉiuj lokoj.

Je la 18. V. 1969 k-do Teodoro Kulagin informis la ĉeestantojn pri la oficialaj sciigoj de 54 UK de Esperanto en Helsinki. Kion preparis por la Kongreso la soveta delegitaro? Sovetan eldonon de „Paco“ kun suplemento de raporto pri 50 jaroj de Sovetlando. Libreton „Du noveloj“ de A. Gajdar, numeron „Por la Paco“. Medicinistoj el UMEA preparis du raportojn pri la atingoj de soveta medicino; la ĵurnalistoj el TEĴA, la agrikulturistoj el ELASE, la virina fako de MEM — ĉiuj havas proprajn interesajn materialojn, kiujn oni intencas prezenti al la Kongreso.

La novelektita prezidanto de esperantistoj-veteranoj en Sovetunio k-do S. N. Krajnov kore dankis pro la fido kaj promesis aktive labori por la plena registrado de la veteranoj. K-do B. V. Tokarev faris interesan informon pri la fakultativa instruado de Esperanto en mezlernejoj de Litovio.

K-do T. Kulagin sciigis pri la televida programo de esperantistoj en Kiev la 10. V. 1969, kie kvar esperantistoj-studentoj kaj k-do P. Vasilĉenko dum 15 minutoj rakontis pri Esperanto. En urbo Ufa (Uralo) en lokaj ĵurnaloj ofte aperas informoj pri Esperanto. Lastatempe similaj propagandaj artikoloj aperis 33-foje.

27.V. 1969 MIEK aranĝis specialan vesperon, dediĉitan al helpo de Vjetnamio. Post la raporto de N. D. Sulje oni aranĝis senmalgajan loterion, dum kiu estis lotumitaj pli ol 300 esperantaĵoj. La tuta profito de tiu loterio estas oferita helpe al batalanta Vjetnamio.

T. Kulagin

SEJM KUNORDIGAS SOVETAN E-AGADON

Soveta Esperantista Junulara Movado (SEJM) ne estas oficiala Esperanto-organizo. Ĝi estas nur libervola unuiĝo de la reprezentantoj de junularaj kluboj, kiuj inter si elektas estraron, kaj kies decidoj havas propran, rekomendan karakteron. En SEJM estas reprezentitaj jam 52 sovetaĵoj urboj, kaj ĝian agadon oni plenumas en sep diversaj fakoj, nome koresponda, magnetofona, informa, literatura, metodika, fota kaj terminara.

UNUIĜO DE POLAJ STUDENTOJ UZAS KAJ FAVORAS ESPERANTON

La 7-a Kongreso de la Unuiĝo de Polaj Studentoj (ZSP) okazis en Varsovio de 10—12 de februaro 1969. Ducent kvindek delegitoj de tiu ĉi granda organizo, kiu membrigas 186 840 polajn studentojn, debatis pri la estonta politiko de ZSP kaj elektis novan estaron.

ZSP ne estas strikte politika organizo. Ĝi posedas universalan karakteron kaj okupiĝas pri diversaj aspektoj de la vivo de la studentoj — edukado, kulturo, materiaj bezonoj, ripozo, sporto. Pro tio 80%—90% de la studentaro apartenas al ZSP.

La Unuiĝo direktas ankaŭ la sciencon aktivecon de la studentoj. En tiu ĉi fako ekzistas jam de multaj jaroj kunlaboro de la Unuiĝo kun la esperantistoj. En la universitatoj de

Torun, Krakov, Lublin, ĉe la Politekniko de Gliwice kaj aliaj, agas studentaj sciencaj Esperanto-rondoj. Dum pluraj jaroj ZSP eldonis kune kun Pola Esperanto-Junularo la revuon „Tamen“. Dum la du pasintaj jaroj la studenta revuo „Iti“ enhavis Esperanto-rubrikon. La Unuiĝo per sia aŭtoritato kaj financa subtenis plurajn Esperanto-seminariojn. Studentoj-esperantistoj estas ofte samtempe aktivaj en ZSP. Kelkaj estis distingitaj per meritinsigno de la organizo. La konfidon de la Unuiĝo al la esperantistoj konfirmas certe ankaŭ la fakto, ke la estro de la Kongresa Gazetara Servo estis la konata aktivulo de la junulara Esperanto-Movado Roman Dobjinski.

TEJO-novaĵoj, № 8/1969

NOVZELANDA JUNULARO PRODUKTIS FILMON

„Estas vera plezuro observi la laboron de la junuloj“ — jen la vortoj de unu vizitanto al Novzelanda E-Kongreso en Blenheim. En la laboro de la kongreso, sed kiel tute aparta programo, samtempe okazis kongreso de la novzelanda TEJO-sekcio, EJANZ. La junaj kongresanoj partoprenis lingvajn sesiojn, sportajn aktivecojn kaj kulturajn programerojn. Ĉeestis du vizitantoj el Japanio. Stefan McGill, redaktoro de la bulteno „Junularo“, prezentis kloran sonfilmon pri la agado de EJANZ

al la anoj de la Novzelanda Kongreso kaj ankaŭ estris junularan koncerton, kiu formis parton de la kongresa programo. Nova prezidanto de EJANZ estas Tony Richardson, kiu ankaŭ ĵus elektiĝis redaktoro de la nacia Esperanto organo „Novzelanda Esperantisto“. Aktivecoj de EJANZ inkluzivas aperigon de legolibreto por komencantoj kaj kontaktadon kun la ĉ. 20 novzelandaj lernejoj, en kiuj oni instruas Esperanton.

TEJO-novaĵoj № 7/1969

peranto-Asocio. Ili do okazigis la Unuan Kulturenan Festivalon de PEJ en tiu urbo komence de aprilo. Partoprenis en ĝi pli ol 80 gejunuloj el la tuta lando kaj kelkaj eksterlandaj gastoj. Ĉefaj programeroj estis konkursoj

Porinstruista E-kurso en Ŝumen, gvidita de Canko Murgin

pri kanzonoj kaj kantoj, pri diskutado kaj pri poezio. Ankaŭ okazis diversaj aliaj kulturaj prezentaĵoj. Ni esperu, ke la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof fariĝos grava centro de la esperantista kultura movado.

APEROS KOMERCA VORTARO

Jam kvin jarojn laboris Instituto por Esperanto en Komercio kaj Industrio (EKI) super la deklingva komerca industria terminaro, kiun ĝi rigardas kiel la unuan kondiĉon por serioza laboro sur tiu kampo. Nun la ampleksa terminaro estas preskaŭ prespreta, kaj konata nederlanda eldonejo Kluwer akceptis eldoni la verkon je sia kosto. Pro la metodo de kompilo la vortaro estos vaste uzebla, ankaŭ sen scio de Esperanto. Tial ĝia publikigo ne dependas nur de la Esperanta merkato.

EKI laboras sub aŭspicio de UEA, kaj du el ĝiaj tri estraranoj estas samtempe estraranoj de UEA. Tuj kiam ĝia fundamenta terminologia laboro estos finita, ĝi povos turni sin al la konkretaj taskoj, kiujn enhavas ĝia laborplano: eldono interalie de luksa revuo por komercio kaj industrio, eldono de lernolibroj pri komerca korespondado, sistema kontaktado kun gravaj komercaj firmoj ktp.



Novaj esperantistoj, komencante uzi la lingvon post ĝia lernado, ofte ne povas trovi konvenan vorton por esprimi sian penson kaj erare uzas neĝustan vorton. Tio estas ordinara kaj natura fenomeno ankaŭ rilate al aliaj fremdaj lingvoj. Paralele kun ĉiam pli ofta aplikado de la lingvo iom post iom eraroj de tiu ĉi speco ĉesas aperi en la lingvaĵo de la uzanto. Tamen, se esperantisto aŭdis el la buŝo de sia instruanto eraran uzon de iu vorto, tiu ĉi malsano restas pli daŭra, ĝi ne estas facile kuracebla. Kreiĝas malbona kutimo, kiun oni devas elradiki.

Bezonante vorton, kiun la esperantisto ne scias, li ordinare serĉas ĝin en vortaro. Sed ankaŭ malbona vortaro povas erarigi.¹

Sed ofte ankaŭ ĉe bona vortaro ne-sperta esperantisto povas kompreni erare signifon de vorto, se li malatente legas la interpreton. Iam bona esperantisto tradukis tekston el bulgara lingvo en Esperanton kaj bezonis la esperantan vorton por *сарма*. Li ne priatentis, ke en bulgara lingvo estas *сарма* (kulinaraĵo) kaj *сърма* (pasa-mentaĵo), kaj tradukis *сарма* per *fili-grano*.

Multaj neglektas, ke iuj vortoj estas plursignifaj kaj ke ne ĉiujn ĉi signifojn havas la responda vorto en la alia lingvo. Ordinare plursignifa vorto havas unu bazan (kernan) signifon,

apud kiu ariĝas kelkaj kromsignifoj (plej ofte laŭ la voĵo de la metaforo¹). La bulgara *широк* havas signifon de *larĝa* kaj de *vasta*; *larĝa* esprimas en Esperanto dimensiecon en unu direkto (larĝa rivero, larĝa ŝtofo ktp.), dum *vasta* esprimas parenkan dimensiecon en ĉiuj direktoj (vasta ĉambro, vasta kampo ktp.). Por la bulgara „Той тръгна по *широкия* свят“ ni uzas ne „tra la *larĝa* mondo“, sed „tra la *vasta* mondo“. Посвещавам havas signifojn *dediĉi* (dediĉi libron, dediĉi sian tempon ktp.) kaj ankaŭ *inici* (en-sekretigi: inici iun pri la sekretoj de ideo, de movado, de organizaĵo ktp.). Бягам: *fuĝi*, *forkuri* — por malproksimiĝi kaj por ne esti kaptita; *eviti* (respondecon—бягам от отговорност); *kuri*, *iri*, *rapidi* (бягам да купя ест-ник) ktp.

Kontrolilo por trafi ĝustan konkretan signifon de vorto (en komplekso kun aliaj vortoj) povas esti ĝia sinonimo: *широк* — *обширен*; ni povas diri *обширно поле*, *обширен свят*, (*vasta*), sed pri pantalono ni ne povas diri *обширен* — ĝi estas nur *широк* (*larĝa*).

Доя: *melki* (bovinon), sed² patrino ne „melkas“ bebon, sed (*мам*)*nutras* ĝin; sinonimo: *кърмя*. Oni devas atenti ankaŭ pri la signifo de homonimoj: *осветявам* — a) *lumigi*; b) *inaŭguri*;

¹ Multaj eraroj estis en la vortaroj Esp.-bulg. kaj Bulg.-Esp. en la historia „Manckonduko“, laŭ kiu lernis la lingvon la unua esperantista generacio en nia lando. La kaŭzo estis, ke la verkintoj de la lernolibro ne posedis ankoraŭ sufiĉe perfekte la Internacian Lingvon, sed tradukis la vortojn el rusa vortaro. Tamen ili re konis perfekte ankaŭ la rusan lingvon, pro tio ekz., ili ĉenis al *ĉerko* signifon de *tombo* (гроб), ĉar en la rusa lingvo *ĉerko* estas гроб, dum en la bulgara *ĉerko* = ковчег, sed гроб = tombo.

² Ekisto de signifo de la vortoj, la evoluo kaj la ŝanĝoj en la komenca signifo, kreiĝo de kromsignifoj, la faktoroj, kiuj influas sur tiujn fenomenojn, estas objekto de la *semasiologio* (semantiko) — fako de la lingvoscienco. Karakteran ekzemplon pri la evoluo de la signifo prezentas la angla vorto *sad*, kiu inter 1000 kaj 1450 j. signifis „kontentigita“, kaj ankaŭ „lacigita“, sed de 1340 ĝis 1590 ankaŭ „rekta“, „firma“, plue 1382—1475 „forta, energia“, post 1375 jaro — „akurata; serioza“; inter 1400—1525 — „solida; instruita“, en 1366 — „malĝoja“.

sanktigi; oni *lumigas* ĉambron (metafore ankaŭ demandon ks.), sed *inaŭguras* monumenton, kongreson, preĝejon ktp.

Parolante pri tiuj aferoj, ni devas averti, ke strebante al senerara esprimado per ĝustsignifaj vortoj, oni ne venu al la alia ekstremo: eviti ĉian metaforan, pli larĝsignifan uzon de la vortoj. Ekzemple, *межък* estas en Esp. *peza*, *pezanta*, sed oni povas uzi ĝin ne nur pri materiaj objektoj, kiuj havas pezon, sed ankaŭ pri abstraktaj nocioj: peza zorgo, peza penso, peza laboro ktp. — ĉio ĉi „pezas“ sur la animo; tiel ni disponas en Esp. paralele al *peza* sinonimojn: *malfacila* (laboro, tasko ktp.), *pen(ig)a* (laboro, penso ktp.), kaj pli fortajn: *prema* (premanta), *turmenta* ktp; ankaŭ: *peza* vorto, parolo, sinteno (=grava) ktp.

Interesa okazo pri erara uzo de vortoj kun malsamaj signifoj estas la intermikso de la esp. *okazas (ke)* = *случва се (че)* kun la bulgara *оказва се (че)* (certe pro la egala sonkonsisto); en la bulg. lingvo estas klare sentata la diferenco inter *случва се* и *оказва се*: *Случи се*, че той беше дошел един ден по-рано = *Okazis* (tiel), ke li estis veninta unu tagon pli frue. *Оказа се*, че той беше дошел един ден по-рано = *Pruviĝis (montriĝis, evidentiĝis)*, ke li estis veninta unu tagon pli frue.

Prepozicioj

Ordinare la prepozicioj estas konsiderataj kiel simpla kaj facile komprenebla vortklaso, kaj pro tio ĉe la lernado oni iom rapide, sen sufiĉa atento

konatiĝas kun ili. Sed ĝuste en ilia uzado ne nur bulgaraj, sed ankaŭ alilingvaj samideanoj faras erarojn, ĉiam pro nesufiĉa atento pri ilia ĝusta signifo kaj pro influo de la nacia lingvo. Pri la plej gravaj prepozicioj mi donis sisteme detalajn klarigojn en la revuo „Bulgario“ (1964 — n-roj 5, 6, 8, 9, 1965 — n-roj 2 kaj 5). Tie la interesatoj povas legi pli multe pri iliaj signifoj.

Inter la eraraj uzoj de bulgaraj esperantistoj impresis min io tre grava: uzo de *de* anstataŭ *al*, ekz. mi donas *de* vi, mi veturis *de* Plovdiv k. a. (anstataŭ mi donas *al* vi, mi veturis *al* Plovdiv); certe la kaŭzo estas, ke en bulgara lingvo ambaŭ prepozicioj tradukiĝas per sama *на*. Atenta relernado de la signifo de la prepozicioj evitigus tian nepermeseblan eraron¹.

Rilate al elekto kaj uzo de konvena, trafa vorto oni spertiĝas dum la praktikado de la lingvo kaj ankaŭ per legado de bonstilaj verkoj. Laŭ tiu ĉi vojo oni akiras lingvan senton, kiu gvidas nin en la aplikado de la lingvo. Kaj ĉiu, kiu lernas lingvon, nepre havas deziron kaj ambicion posedi kaj uzi ĝin kiel eble plej senerare.

¹ Bedaŭrinde eraran uzon de *de* anst. *pri* mi vidis en la stilo de klera itala s-ano: „tion oni povas diri *de* la poetoj“, „oni povas paroli laŭvice *de* dialekto de Cremona, *de* Lombardia dialekto, *de* norditala dialekto“. Tiu ĉi eraro, sekvo de influo de la itala (kaj la franca) lingvo, malbeligas la cetere belegan artikolon (prelegon), presitan en „Scienca Revuo“, vol. 20, № 1; pri tio kulpon havas ankaŭ la redakcio de la revuo.

A. D. Atanasov

Floradu kaj firmiĝu ĉiam pli kaj pli dum la jarcentoj la viviĝa bulgara-soveta amikeco — suno kaj aero por nia popolo!



En 1968^{*} aperis la libro „Kiel ekestos la ĝenerala lingvo?“ de la soveta sciencisto E. Svadost^{*}. La libro prezentas sciencan esploron de la problemo pri internacia lingvo kaj meritas la atenton de la esperantistaro ne nur pro tio, ke ĝi okupiĝas pri la problemo de internacia lingvo kaj surbaze de abunda scienca materialo pledas ties neceson, sed ankaŭ pro la fakto, ke ĝi estante verko de kritikisto kaj kontraŭulo de Esperanto, objekte kondukas al konfirmo de la Esperantaj fundamentaj principoj.

La unua baza tezo de la aŭtoro tekstas, ke la internacia lingvo estas vivnecesa bezono de nia kaj de la estontaj epokoj. Ĉi tiun tezon la aŭtoro pruvigas tiel konvinke, ke li havas plenan rajton en la fino de la libro meti la demandon: „Ĉu iu kuraĝos aserti, ke komprenebla de ĉiuj kaj ĝenerala por ĉiuj lingvo ne estas necesa — nek hodiaŭ, nek morgaŭ, nek en la estonteco?“

La dua baza tezo estas, ke la rolo de internacia lingvo povas plenumi nur konscie konstruita lingvo. La naciaj lingvoj ne nur ne devas, pro konsideroj de nacia digno, sed ankaŭ ne povas plenumi la rolon de internacia lingvo. La naciaj lingvoj ne povas plenumi la rolon de internacia lingvo ne pro tio, ke ili estas naturaj kaj la internacia lingvo devas esti artefarita. La aŭtoro kategorie forĵetas la koncepton pri ekzistado de naturaj kaj artefaritaj lingvoj. Laŭ li ĉiuj lingvoj estas kreaĵo de la homo kaj ne de la naturo, do ĉiuj lingvoj estas artefaritaj. Naturaj lingvoj ne ekzistas. La naciaj lingvoj ne povas, laŭ la aŭtoro, plenumi la rolon de internacia lingvo pro la principa neebleco de ties plena ekpo-

sedo flanke de homoj, al kiuj la lingvo ne estas gepatra.

La tria baza tezo de la aŭtoro tekstas, ke Esperanto ne povas plenumi la rolon de internacia lingvo. La argumento tamen estas tia, ke ĝi ne nur ne apogas, sed refutas la tezon de la aŭtoro. La aŭtoro agnoskas, ke Esperanto havas konsiderindan aplikadon kiel internacia lingvo. Sed se estas tiel, Esperanto do plenumas per tiu ĉi konsiderinda aplikado la rolon de internacia lingvo. Laŭ la aŭtoro, la internacia lingvo estas nesesa ne nur por la fora estonteco, sed por tuja uzado kaj aplikado. Sed kiel oni povus kontentigi tiun ĉi tujan, urĝan bezonon, se oni forigus Esperanton? Ja la aŭtoro mem agnoskas, ke preta alia internacia lingvo, kiu povus anstataŭigi Esperanton, ne ekzistas? La aŭtoro mem substrekas, ke la proponita de li maniero de ellaboro de internacia lingvo estas tre kompleksa, peniga, longa. Sed se la internacia lingvo estas urĝe bezonata kaj la ellaborado de nova lingvo estas ebla nur post longa laboro, pro kio dumtempe ne devas esti uzata la jam ekzistanta Esperanto, eĉ se ĝi posedas la malperfektaĵojn, kiujn la aŭtoro malkovras en ĝi? Li timas, ke la uzado de malperfekta lingvo povas malhelpi la kreadon de perfekta lingvo. Sed ĉu en la batalo inter malperfekteco kaj perfekteco en la homa historio fina venkinto povas esti la malperfekteco? Io pli. La perfekteco de iu lingvo ne povas esti pli bone, pli konvinke pruvita ol en batalo kontraŭ malperfekta lingvoj. Kaj ĝuste pro la neceso krei estonte perfektan lingvon estas preferinda ne la forigo, sed la ekzistado kaj la disvastigado de Esperanto, kiu jam ekzistas kaj plenumas la rolon de internacia lingvo, por ke ĝi estu profitata kiel eksperimenta bazo

* Э. Сवादост. Как возникнет всеобщий язык? Москва, 1968.

ĉe la ellaborado de la lingvo, dezirata de la aŭtoro.

Sed en kio konsistas la riproĉitaj malperfektaĵoj de Esperanto? Grava malperfektaĵo de la lingvo, laŭ la aŭtoro, estas ĝia „okcidenta“ leksiko. Sed se la leksiko ne estas okcidenta, tiam ĝi estus orienta. Kaj se la okcidenteco de la lingvo estas malperfektaĵo, ĉu ĝia orienteco estus perfektaĵo? Aŭ la vortoj devas esti samtempe okcident-orientaj? Sed tiam la leksiko ne estos aposteriora—kaj al aposteriora lingvo la aŭtoro mem donas siajn preferojn. Aŭ la leksiko devas esti dividita je okcidenta kaj orienta parto? Sed la aŭtoro mem aliloke en sia verko manifestiĝas kiel kontraŭulo al la ideo de pura mekanikeco ĉe la kreado de la leksiko de l' internacia lingvo. Finfine, ĉu estas grave, el kie estas veninta iu vorto, ĉu el okcidento aŭ el oriento? Gravas, ĉu la vorto povas esti bone manipulata en la buŝo de la homo. La netaŭgeco de tiu aŭ alia „okcidenta“ (kaj eventuale „orienta“) vorto devas esti konkrete pruvita. Sed tion la aŭtoro ne faras.

Alian malperfektaĵon de Esperanto la aŭtoro trovas en la larĝeco de la signifo ĉe la prepozicioj. Ne nur la prepozicioj, sed ĉiuj leksikaj elementoj

en Esperanto havas tian larĝecon, kian havas ankaŭ ĉiuj lingvoj. Tio estas imanenta leĝo de ĉiuj lingvoj.

Sekva malperfektaĵo — la soneco de Esperanto. Evidente estas tamen, ke la aŭtoro eliras ne el iu scienca esploro de la leĝoj de la lingva belsoneco, sed el siaj impresoj, nebazitaj tamen sur kono de la granda Esperanta poezia verkaro.

Finfine li riproĉas Esperanton pro la simpligo de la verbaj tempoj, forgesante tamen, ke li mem rekomendas kiel fundamentan trajton de la internacia lingvo ĝian plenan logikan sistemon, kiu tamen ne estas ebla sen simpligo de la verbaj tempoj.

La direktita kontraŭ Esperanto kritiko estas farita, kiel prave diras unu el la redaktoroj de la libro (prof. E. A. Bokarev), sen profunda lingvistika analizo, ĝi ne nur ne konvinkas, sed klare montras sian malfortecon kaj fakte, kiel ni jam diris, kondukas al konfirmo de la Esperanto-principoj, tiel bone eksponitaj de la aŭtoro mem, kontraŭ lia volo, en la fortaj, belaj, konvinkaj paĝoj de la libro. En tiuj paĝoj estas defendataj kun ekskluziva pasio kaj argumentado la bazaj principoj de la internacia lingvo.

Ljubomir Miĥajlov

„TERA LUMO“

Romano de Stojan Daskalov

Mi estis tre agrable surprizita, kiam la verkisto Stojan Daskalov sendis al mi sian novan romanon „Tera lumo“¹. Surprizo unue estis la aŭtografo en Esperanto: „Al mia samideanino. . .“

Ĉi tiu aŭtografo speciale kortuŝis min. Mi jam sciis, ke antaŭ multaj jaroj, kiel instruisto en vilaĝo, Daskalov lernis Esperanton. Sed li delonge ne okupis sin pri ĝi. Unu el la plej produktivaj nuntempaj bulgaraj verkistoj, Daskalov estas droninta en multege da laboro super siaj noveloj kaj romanoj. Kial nun li rememoris pri Esperanto?

¹Daskalov Stojan, Tera lumo, romano. Sofio, 1968, eld. „Bulgara Verkisto“, p. 352.

Respondon mi trovis tuj, kiam mi komencis legi la romanon: ĉar la Zamenhofaj ideoj lumigis ĝin. Jam de la unuaj paĝoj la ĉefa heroo de la romano, Bratan, kaptas nian atenton. Li elkreskas brava kaj progresema junulo. Por tio kontribuas ankaŭ Esperanto. Estas la tempo, kiam la Bulgara Komunista Partio pere de RMS (Laborista Junulara Unuiĝo) en la 30-aj jaroj alvokis la junularon eklabori en la kooperativa, abstinula kaj esperantista movadoj, en la popolaj legejoj, sportaj kaj aliaj kulturamasaj organizaĵoj. Bratan grupigas la vilaĝan junularon ĉirkaŭ sin. Li instruas al ĝi Esperanton. Kaj ne nur Esperanton, sed ankaŭ amikecon. Ĉar Esperanto estas amikeco. Bratan rakontas al la junuloj pri aliaj landoj kaj popoloj, legas al ili leterojn, kiujn sendas al li liaj korespondantoj el fremdlando. En la vilaĝo li faras plej bonan propagandon de



la socialismo. La vilaĝa junularo soife englutas ĉiun vorton el la leteroj, kiujn li ricevas el Sovetunio.

Bratan vekas envion kaj malicon ĉe la vilaĝaj regantoj. La faŝistoj komencas lin ĉiumaniere persekuti — jen per malpermesoj de lia agado, jen per minacoj, jen per arestoj. Sed la internacia sento, kiu naskiĝis en li, faris lin forta. Li sukcesas transdoni al siaj gekursanoj-esperantistoj la senton de internacia solidareco, kiu plenigas la korojn per ĝojo. Tio ĉi ne estas ordinara ĝojo. Ĝi estas ĝojo de homo, kiu eksentis sin egala kaj proksima al la homoj de la tuta mondo.

En la vilaĝo Bratan eble plej multe suferas de la faŝistaj regantoj. Post la Naŭa de Septembro, kiam la libero ekbrilis super nia lando, li jungas siajn fortojn en raciigoj kaj inventoj. Ĉion ĉi li faras pro amo al la homoj. Sed en la vilaĝo oni ne komprenas lin sufiĉe bone. Al iuj li ŝajnas iom stranga pro la plena manko de praktikismo, aliaj envias lin. Nur la partia sekretario komprenas kaj helpas lin. Fine li sukcesas ekbridi lian elementon.

Per sia ĉefa heroo Bratan la aŭtoro altigas la figuron de la bulgara esperantisto, faras lin inda je estimo.

En sia romano Daskalov uzis kelkajn Esperantajn esprimojn. La plimulto de ili tamen

estas eraraj. En privata Interparolo la aŭtoro konfesis, ke li faris la erarojn trofidante sian memoron, kaj promesis korekti ilin ĉe dua eldono. Sed ili ne ĝenas la esperantiston senti fieron legante la romanon.

Ni dezirus renkonti la ĉefan heroon de la romano hodiaŭ. Ni volus trovi lian nuntempan prototipon. Kie ni povus trovi lin? La verkisto helpas nin: la prototipo de Bratan hodiaŭ estas laboristo en la uzino, proksime de nia vilaĝo. Li estas raciiganto kaj inventanto, aktiva kaj sindona konstruanto de la socialismo en nia lando.

Mi varme rekomendas la romanon „Tera lumo“ al ĉiu bulgara esperantisto. Ĝi vere estas leginda. Samtempe mi, kiel esperantistino, gratulas la aŭtoron kaj dankas lin pro lia verko, dediĉita al nia Esperanto-Movado. Kaj mi esprimas la kredon, ke li ankaŭ estonte respegulos nian Movadon en sia altarta verkaro.

L. Paspaleeva

Noto de la Redakcio. № 7-8 de „B. E.“ estis en la presejo, kiam oni anoncis, ke la verkisto St. C. Daskalov ricevis Dimitrov-premion pro la romanoj „Respubliko de la pluvoj“ kaj „Tera lumo“. En № 9 ni donos fragmenton el „Tera lumo“.

Je la 8—9 de majo ĉi-jare en Karlovo oni celebris 100 jarojn de la fondiĝo de l'unua abstinula societo ĉe ni. Sobruloj el la tuta Patrolando kolektiĝis por festi tiun ĉi datrevenon. Konate estas, ke niaj revoluciuloj, batalantoj kontraŭ la turka jugo, ĉefe kun

Levski, estis abstinuloj kaj postulis abstincon de siaj adeptoj.

Ĉi-sube ni donas fragmenton el la romano „Benkovski“ de L. Stojanov, kiu priskribas tiurilate unu el la plej elstaraj gvidantoj de nia Nacia Revolucio — G. Benkovski

LA DIABLA TRINKAĴO

de *Ljudmil Stojanov*

Tio okazis en vilaĝo Petriĉ dum la Aprila Ribelo.

Malfrue posttagmeze por la ribelula taĉmento estis preparita longa manĝotablo. Estis bakitaj ŝafidoj kaj kuiritaj kelkaj kaldronegoj da manĝaĵo. Petriĉanoj — viroj kaj virinoj — konkuris por priservi. La gastoj estis amataj homoj, oferintaj ĉion plej karan por la bono de la popolo. La manĝotablon ĉirkaŭiris multe da kruĉoj, iuj kun akvo, aliaj kun vino. . .

Kiam Benkovski, vizitinte siajn homojn, vidis la diablan trinkaĵon, li paliĝis de kolero.

— Kiu alportis tiun malpuraĵon? — ekkriis la vojevodo.

Kaj preninte unu post la alia kelkajn kruĉojn, li rompis ilin sur la te-

ron. Aliajn li puŝis per piedo kaj arestis kelkajn „ebrietajn“.

— Ni, sinjoro, — senkulpigis sin petriĉanoj, — por ke la junuloj trinku, estas nun Georgofesto, ĉu ne?

— Ne estas pli granda krimo por ribelanto ol trinki vinon, — diris Benkovski. — Laŭ nia statuto, ribelanto, kiun oni kaptus trinki, estos punata je morto.

Li kolektis la ribelulan taĉmenton ĉirkaŭ sin kaj anoncis, ke estas malpermesite plej severe al ĉiuj konsumi vinon aŭ brandon, ĉar ekzistas nenio pli naŭza ol ebria homo. Kaj por ribelanto ebriiĝo egalas al perfido. Ĉiu devas skribi tion ĉi sur sian orelon.

— En mala okazo, — finis Benkovski, — la puno estos mortigo.

Trad. L. Moralieva

POR LA MALGRANDAJ ESPERANTISTOJ

ATENDADO

de Nikolaj Draganov

Dediĉita al fratoj
Nikola kaj Dimitr Patarinski

Kiam Milĉjo revenis el la lernejo, ĉiuj hejme estis dronintaj en profundan silenton. Li restis iomete antaŭ la ĉambro kaj atendis, ke oni alparolu lin, sed kompreninte, ke neniuj okupiĝos pri li, senbrue kaj silente forkuris en la alian ĉambron. La forno ne estis hejtita kaj la aero odoris je malvarmaj kalkitaj muroj. La knabeto demetis la saketon kun la libroj de sia dorso, proksimiĝis al la fenestro, metis ĝin tien kaj el lia brusto eliĝis longa ĝemsopiro. Li komprenis, kio estis okazinta. Tri tagojn jam lia patro iris en la korton de la komunumo por rekoni inter la murditoj lian pli aĝan fraton Petko. Kaj ĉiam li revenis kun disenditaj manoj, ekstaris sur la sojlo kaj diris: „Mi ne rekonis lin, eble ne estas inter ili“. Kaj en liaj okuloj aperis eta flameto, kiu serenigis la lacan frunton. Ĉi-foje flameto ne estis.

Kaj tamen Milĉjo ne kredis, ke lia frato Petko estas mortigita. Eble lia paĉjo eraris. Ja li diris, ke la partizanoj estas kun tiel difektitaj vizaĝoj, ke eĉ iliaj laŭsangaj patrinoj ilin ne rekonas. Al sia paĉjo Milĉjo ne koleris — ŝajne li eraris pro la angoro, sed li koleris al sia pli aĝa frato Koljo kaj al sia fratino Penka — kial ili kredas!

La knabeto apogis sin je la fenestro kaj komencis grati ĝian kovritan per glacio vitron. Liberiginte sufiĉan spacon, li kliniĝis kaj antaŭ liaj okuloj malkovriĝis la strato. Ekstere ankoraŭ neĝis. La neĝeroj sin puŝis, kuris jen antaŭen, jen malantaŭen kaj kiel lacaj petolintaj infanoj kuŝiĝis kien ajn — sur la branĉojn de la arboj, sur la amasigitajn maizstumpojn, sur la tegmentojn de la domoj. La griza ĉielo malsupreniĝis pli; sur la teron nerimarkite falis facila krepusko. . .

Ili vespermanĝis en silento ne rigardante sin, ne elbuŝigante eĉ unu vorton. Milĉjo atendis, ke oni finfine diros al li, laŭ kio la patro estis rekoninta lian fraton inter la mortigitoj.

Kaj ĉar oni ankaŭ nun ne diris tion, li ne eltenis kaj demandis:

— Pacjo. . . laŭ kio vi rekonis fraĉjon?

— Laŭ la blanka buklo super la frunto — mallaŭte, sufokite eksonis la voĉo de la patro.

Milĉjo nenion plu demandis. Pri simila temo oni ne konversacias facile. Derove li iris en la alian ĉambron. Kaj ne hejtis la forncon, ne lumigis la lampon, sed kuntiriĝis sub la litkovrilo kaj enigis manojn inter la genuojn. . .

Kial lia paĉjo estis trompinta sin? Ĉu malmultaj homoj ekhavas frue blankajn harojn? Eĉ pli junaj ol lia fraĉjo. Partizani ne estas facile. Oni devas toleri kaj malvarmon, kaj malsaton, dormi kie ajn. Kaj jen — la haroj blankiĝis. Se estas facile, kiom multe da homoj fariĝus partizanoj! . . .

Kelkiam, restante sola en la hejmo, Milĉjo deprenis la portreton de sia frato desur la muro kaj demandis lin flustre: „Ja vi diris, ke kuglo vin ne trafas! Ĉu vere?“ Kaj ŝajnis al li, ke la lipoj de lia frato moviĝetas, kaj liajn okulojn lumigas rideto. Milĉjo metadis la portreton sur ĝian lokon kaj ekkuradis sur la straton kun espero en la koro. . .

La vintro forpasis, la neĝo degelis, super la domoj jam ne sterniĝis la blueta fumo de la kamentuboj. En la ĝardeno disfloris la arboj, en la floriĝardenetoj ekflamis la hiacintoj. La arbaro eksusuris, la birdoj ekkantis, post la lignoplugiloj ekpaŝis la plugistoj.

Iufoje en la lernejo Milĉjo kolektis



siajn plej fidelajn amikojn kaj diris:
— Ĉi-nokte ni intervidiĝis kun fraĉjo.
La infanoj malfermegis la okulojn.
— Sed ja. . . li estas mortigita! —
diris unu.

— Stultaĵo! . . . — mansvingis neglekte Milĉjo. — Tiel parolaĉas la ĝendarmoj. Mi konversaciis kun li. Li lasis kreski barbon ĝis la zono kaj tra la brusto krucigis rubandojn kun kartoj, sur la koksoj kroĉis bombojn.

— Kaj kion li diris al ci? — demandis alia knabeto.

— Li diris al mi ne kredi, ke li estas mortigita, sed atendi lin baldaŭ aŭdigi sin denove.

Tio, kion Milĉjo rakontis al siaj kamaradetoj, estis vera, sed li rakontis al ili sian sonĝon. En la nokto, vekiginte, li alkuris la fenestron, malfermis ĝin larĝe kaj ekrigardis eksteren. Estis kvietaj varma nokto, plena je mallaŭtaj voĉoj de vekigintaj birdoj, kun grandaj, steloj, dolĉeta aero, odoranta je absinto kaj geranio. De lia fraĉjo estis nenia postsigno. Al Milĉjo nur ŝajnis aŭdi rapidajn paŝojn — kaj nenicn plu. Tio estis la paŝoj de l' nokta venteto. Milĉjo ne ekdormis ĝis la mateno. Li kredis, ke lia frato estis veninta gaste al li.

Finfloris la arboj, donis fruktojn, la fruktoj maturiĝis, la ĉiela bluo fariĝis pli densa, la birdoj eksilentis, la cikonioj en longaj karavanoj forflugis ien malproksimen.

Alvenis buntkolora aŭturo. Kiam la aŭtunaj tagoj estas klaraj, al vi ŝajnas percepti ian mallaŭtan, tristan sonoron. Ce tia aŭtuna sonoro oni dormas profunde. Tiel dormis ankaŭ Milĉjo, kiam iu forte ekfrapis sur la fenestrovitro kaj lia voĉo ektondis kiel bombo:

— Kuru, la partizanoj descendas en la vilaĝon! . . .

Milĉjo ne havis tempon eĉ sian jaketon meti sur la dorson. Kiel li estis — nudpieda, en ĉemizo, forkuris el la ĉambro kaj ekflugis tra la stratoj. Junaj kaj maljunaj, virinoj, viroj kaj infanoj kuris impete al la supra rando

de la vilaĝo. Milĉjo preterkuris ĉiujn kaj ekstaris persone antaŭ la partizanoj. Ili estis supersutitaj per floroj kaj armiloj. Malantaŭ ili kaj ĉirkaŭ ili — homamaso. Milĉjo rigidiĝis: kie estas lia frato? . . . Ĉu ne estas tiu, la tria dekstre? Milĉjo tuj rekonis lin, nur lian ŝultron vidis, sed rekonis lin. Kaj lia korpo streĉtiriĝis, preta por salto. La partizano, la tria dekstre, demetis sian kaskon kaj forviŝis la frunton. Li havis larĝan vizaĝon, konveksajn vangostojn kaj forte blondiĝintan hararon. Tute ne similis al lia frato. Lia frato estas nigrokula, kun ronda frunto kaj ĉiam ridetanta. La muskoloj de Milĉjo malstreĉiĝis, li ekiris malrapide antaŭen. Lia rigardo saltis de partizano al partizano. Jen tiu ĉi ne estas lia frato. Ankaŭ tiu ne estas, sed tiu ĉi . . . Jen kie li trenas sin — je la fino. Sursutita estas de plej multaj floroj. Nek barbon, nek armilon li havas. Tia estas lia frato — ne ŝatas paradi. Ne ŝatas marŝi en la unuaj vicoj. Oni diras, ke nur en la batalo li eliradis antaŭen. Milĉjo rapidigis siajn paŝojn. Li ĵetos sin sur lian bruston kaj eksingultos: „Mi scias, ke vi estas viva, viva, viva! . . .“ Lia fraĉjo siaflanke brakumos lin kaj premos sian vangon al la lia, kiel li faris, kiam ili kune dormis unu ĉe la alia. Milĉjo ne rimarkas, ke li jam ne kuras, sed flugas. Anhelanta, eĉ sen gluto da aero en la brusto, li haltis je du-tri paŝoj de la partizano; tiu ridetis, premis per unu mano la florojn al la brusto kaj la alian levis alten, pugnigis ĝin. „Saluton, brunvizaĝa, malgranda knabo!“ — diris la partizano kaj duafoje ridetis al li. Kiel Milĉjo re povis rekoni sian fraton? Li trairadis la vicojn krietante: „Fraĉjo, he, fraĉjo, kie vi estas?“ La partizanoj jam proksimiĝis al la mezo de la vilaĝo. Subite antaŭ Milĉjo aperis Neŝo Carevski, partizano de lia vilaĝo kaj intima amiko de lia frato. Neŝo estis iom malforta, kun vizaĝo malgrasa kaj nazo iom kurba.

— Mile, saluton! — diris li kaj etendis la brakojn.

— Oĉjo Neŝko, saluton! . . . Kiel vi fartas?

— Ja vi vidas, ni ĉiuj fartas bone. Finiĝis jam la suferoj . . . Kaj ci, kial ci ne iras al la placo?

— Mi serĉas fraĉjon, sed mi ne povas lin trovi en la homamaso. Ĉu vi ne vidis lin?

— Mile, sed ĉu ci ne scias? . . .

Carevski ĉesis lin demandi, ĉar Milĉjo komencis malantaŭenpaŝi, lia vizaĝo paliĝis kaj plilongiĝis. La knabo kovris siajn okulojn per manoj kaj ekkriis:

— Ne diru al mi, ne diru al mi . . .

Li turniĝis kaj ekkuris malantaŭen. Poste eliris el la vilaĝo kaj ekiris supren al la altaĵeto. En la kampo neniu estis. Post kelkaj minutoj Milĉjo ekstaris sur la supro de l' altaĵeto. Okcidente etendiĝis vasta arbaro, kies fino ne estis videbla. De tie alvenisodoro de matura foliaro kaj bluaj krokusoj. Milĉjo, en ĉemizo, nudkapa, kun pantaloneto el hejme teksita kam-

loto, leviĝis je piedfingroj, kiel birdo antaŭ ekflugo, enspiris profunde aeron kaj ekkriis plengorge:

— Fraĉjo-o-o! . . .

La knabo streĉis la orelojn. Subite li eksaltis. Iu tuj respondis:

— O-o-o-o . . .

Estis la eno.

Duafoje li ekkriis forte:

— Fraĉjo-o-o! . . .

— O-o-o . . .

Denove la ĉho.

Trian fojon Milĉjo ne ekkriis. Iel tuj li komprenis, ke tio estas vana. Liaj kruroj fleksiĝis, li malrapide malsupreniĝis sur la altaĵeton, tuŝpremís frunton al la seka herbo kaj ekploregis senkonsole.

Kaj tie, malsupre, sur la placo, meze de la vilaĝo, impetis nevidita ĝis nun rondodanco.

La homoj festis la venkon!

El bulgara: K. Válev

KURIOZAJ FAKTOJ

DE KIO MALSANIĜAS LA BALENOJ?

En lasta tempo la sciencistoj en multaj landoj kun granda atento esploras la malsanojn de la balenoj.

Oni konstatis, ke la malsanoj de la maraj gigantoj estas analogiaj al la malsanoj de la homoj. Ekzemple, ĉe la balenoj estas sufiĉe disvastigitaj malsaniĝoj kiel kronika angino, pneŭmonio, pleŭrito, cirozo de la hepato, ŝtonetoj en la renoj kaj eĉ „kalviĝado“ — defalo de la lipharoj.

El 8—10 kaŝalotoj unu bezonas artefaritajn dentojn, kaj ĉe la pli maljunaj oni ofte malkovras postsignon de pasigita infarkto de miokardo. Estis notita ankaŭ „malbonkvalita“ tumor (kancero). Kiel opinias la esploristoj, ĉe la balenoj ekzistas aktiva tendenco al defenda reakcio — la tumoroj kovriĝas per kompakta histakapsulo, kiu malhelpas aperon de metastazoj.

ELEKTITAJ PROVERBOJ

Ĉio malvera estas efemera.
Nur per fervoro sukcesas laboro.
Konkordo konstruas, malpaco detruas.
Ĝentila vorto — granda forto.
En ĉiu aĝo kresku la saĝo.

LA GLACIKOVRILO DE ANTARKTIDO

La surfaco de la supertera glacia kovrilo de Antarktido estas 12 milionoj da kvadrataj kilometroj. Oni kalkulas, ke se tiu glacio degelus, la nivelo de la tutmonda oceano plialtiĝus per 50—60 metroj.

Kompilis: *T. Dunĉeva*



Pafmortigu min, sed post mi venas miloj, kiuj finplenumos nian aferon!

La antaŭmortaj vortoj de la mortigita de l' faŝistoj Stilijan Peŝev el Sofio (1920—1944)

KANTO DE LA JUNAJ ESPERANTISTOJ

Teksto: Ivan Kolarov

Muziko: Jivka Dekova

Marŝo

Kun for-te kun-pre-mi taj ma-noj ni
mar-ŝas kon-traŭ ĉi-u bar' tra li-moj, mon-toj o-ce-
a-noj es-pe-ran-tis ta ju-nu-lar'. Es-pe-ran-to, Es-pe-
ran-to, lin-gvo de la pac' kaj jun'-fir-ma
ki-el di-a-man-to kaj bri-lan-ta ki-el sun'!

Kun forte kunpremitaj manoj,
ni marŝas kontraŭ ĉiu bar' —
tra limoj, montoj, oceanoj —
esperantista junular'!

Refreno:

Esperanto, Esperanto,
lingvo de la pac' kaj jun' —
firma kiel diamanto
kaj brilanta kiel sun'!

Kaj malgraŭ rasoj, religioj,
komuna lingvo ligas nin —
komuna kiel tero nia
kaj de l' ĉielo la senlim'.

Fortiĝas ni post ĉiu tago,
ĉar milojn logas nia cel',
kaj sur flirtanta nia flago
brilegas ĝi — la verda stel'.

Jen migras tra la vasta mondo
de la juneco la spirit'
kaj vokas la homaron tondre:
„Neniam plu milit', milit'!“

El bulgara: Venelin Mitev

Noto de la Red. Kanto de la junaj esperantistoj estas komponita de nia s-ino J. Dekova el Sofio dediĉe al la IX Festivalo de BEJ.

Ĉefredaktoro: Kunĉo VALEV

Redakta Komitato: Tatjana EVSTRATIEVA, Atanas LAKOV, Venelin MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV, Petr TODOROV.

Korektis: Iv. Sarafov

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

TRA LA GAZETARO

En ĵ. „**Dimitrovsko Zname**“ — Pernik (1. III. 1969) — artikolo de A. Vasev „Lingvo, per kiu oni etendas la manon“, dediĉita al la esperantistoj en Pernik kaj Radomir.

En la sama ĵurnalo (30. V. 69) — artikoleto de N. Mitev „Esperanto kaj turismo“.

En ĵ. „**Ŝumenska Zarja**“ (20. V. 69) — informoj de Cvjatko Todorov kaj Ĵivko -Prašanov „Interesaj elmontriĝoj de la esperantistoj“.

En la sama ĵurnalo (27. V. 69) — „Foreste oni lernas Esperanton“, informo de Ĥanas Bojaĝiev „pri la kurso por instruistoj, organizita de DK de BEA, fako „Popola Klerigo“ ĉe Distrikta Popola Soveto kaj DK de Asocio de Bulgaraj Instruistoj.“

En ĵ. „**Septemvrijsko Zname**“ — Pazarĝik (29. III. 69) — informo de K. Genĉev „pri la jarkunveno de E-Societo Radio“ kaj de la Konferenco de DK de BEA en Pazarĝik, kiu okazis la 23-an de marto.

En ĵ. „**Zarja na Komunizma**“ — Loveĉ (3. IV. 1969) — artikolo „Renkontiĝo post dudek jaroj“ de Coĉo Kolarov. La aŭtoro rakontas pri la Tago de la Libero de l' Hungara Popola Respubliko — la 4-a de aprilo.

En la sama ĵurnalo (10. V. 69) — „La plej granda advokata honorario“ — humaraĵo tradukita de Kiril Kalĉev el Esperanto.

En ĵ. „**Haskovska Tribuna**“ (5. IV. 69) — artikolo „Bonan venon, junaj esperantistoj“ de Dinko Atanasov, prezidanto de la Organiza Komitato de IX Festivalo de BEJ.

En la sama ĵurnalo (8. IV. 69) — artikolo de Geori Karakaĉanov „Festivalo de la libera juneco“, en kiu la aŭtoro detale raportas pri la IX Festivalo de BEJ.

En ĵ. „**Dunavska Pravda**“ — Ruse (9. IV. 1969) — artikoleto „40 jarojn esperantista agado en urbo Bjala“ de J. Kalinov.

En ĵ. „**Naroden Drugar**“ — Jambol (10. IV. 69) — artikoleto „Inda prezentiĝo“ de Dimo Ĵekov; la aŭtoro rakontas kiom da premioj gajnis la geesperantistoj el Jambol en la konkursoj de la IX Festivalo de BEJ en Haskovo.

En la sama ĵurnalo (5. VI. 69) — informo en la rubriko „Okazaĵoj, kunvenoj, renkontiĝoj“, ke la esperantistoj el Jambol kaj vilaĝo Kabile je la 1-a de junio, konekse kun la tago de la pereintaj herooj (2. VI), vizitis la monumenton de la pereintaj kontraŭ aŝistoj en vilaĝo Veselinovo.

En ĵ. „**Rodopski Ustrem**“ (12. IV. 69) — longa artikolo de Maria Diĉeva — „La Esperanto-Movado en distrikto de Smoljan“, en kiu la aŭtorino rakontas pri la III-a konferenco de DK de BEA en Smoljan.

En ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ (17. IV. 69) — en la artikolo „Profundaj spuroj“ la aŭtoro Ĥristo Kamenov rakontas pri la E-poeto Dimitr Zlatarski en v. Dalgopol, distrikto de Varna.

En la sama ĵurnalo (23. IV. 69) — en la artikolo „La defendo de la Paco — tutpopola tasko“ oni mencias ankaŭ la kontribuon de la esperantistoj.

En la sama ĵurnalo (13. V. 69) en la artikolo „Plenkunsido de la Nacia Konsilantaro de l' Patrolanda Fronto“ oni mencias la nomon de Nikola Aleksiev, prezidanto de BEA, kiu partoprenis en la Plenkunsido.

En ĵ. „**Oteĉestven Zov**“ (24. IV. 69) — en la artikolo „Esperantaj sciigoj“ la aŭtoro Bojĉo Mladenov rakontas pri fondo de instruista E-societo „D-ro L. L. Zamenhof“ en Vraca kaj pri la gastado en Vraca de la japana esperantisto Tacuo Huĝimoto.

En ĵ. „**Dobruĝanska Tribuna**“ (24. IV. 69) Ivan Ganĉev rakontas pri la gajnintoj de diversaj premioj el la distrikto de Tolbuhin, partoprenintaj en IX Festivalo de BEJ en Haskovo.

En ĵ. „**Dimitrovgradska Pravda**“ (24. IV. 69) — artikolo de Ĵeko Zaprianov „La esperantista ĥoro denove nacia rekordulo“ kun bildo de la ĥoro, kiu distingiĝis en IX Festivalo de BEJ en Haskovo.

En revuo **Balgara-Săvetska Druĵba** („Bulgara-Soveta Amikeco“) № 4/1969 — artikolo de Angel Todorov en la rubriko „Tradukistoj de Soveta Literaturo“. La aŭtoro parolas pri Ivan Dobrev, kiu tradukadis sovetan literaturon kaj tradukis en Esperanton ĉiujn versaĝojn de Ĥriŝto Botev, iuj el kiuj aperis ankaŭ en ĉina, japana, finna k. a. lingvoj.

En ĵ. „**Ĉervenobrejka Tribuna**“ (15. V. 69) — artikolo de Venecij Georgiev, prezidanto de DK de BEA en Pleven, — „Ni lernu la internacian lingvon Esperanto“.

En ĵ. „**Narodno Delo**“ — Varna (16. V. 69) — sciigo pri la jarkunveno de E-Societo „Albatro“.

En ĵ. „**Transporten Glas**“ (20. V. 69) — artikolo de G. Dolapĉiev — „XXI“ kongreso de la Esperantistoj—Fervojistoj en Eŭropo“.

En revuo „**Zdrave**“ (№ 5, majo 1969) — „Kiel oni malsaniĝu“, humaraĵo de H. Tambian, tradukis el „Heroldo de Esperanto“ M. Conkovski.

En ĵ. „**Oteĉestven Zov**“ (10. VI. 69) — „Japana esperantisto esploras Eŭropon“, tradukis el Esperanto Bojĉo Mladenov kun noto, ke Tacuo Huĝimoto vizitis urbon Vraca dum aprilo ĉi-jare.

En ĵ. „**Iskra**“ — Kazanlâk (14. VI. 69) — artikolo de Ivan Zaĥar ev „V gliĝo“ inter la esperantistoj de urbo Kazanlak.